IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 53 - trimonata
2023/4

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Liu Baoguo
Laura Brazzabeni
Petr Chrdle
Isikawa Tieko
Marija Jerković
Dennis Keefe
Sara Konnerth
Ilona Koutny
Aranka Laslo
Nedeljka Ložajić
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Aimé Patrick Manirakiza
Mónika Molnár
Péter Murányi
Radojica Petrovič
André Staes
László Szilvási
Piroska Szoporyné Szabó
Gerald Tucker



Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Sara KONNERTH, Renardo FÖSSMEIER: *Esperanto en la universitato de Sibio […]* 4
Augusto Casquero, 1945 – 2023 (nekrologo verkita de Dennis KEEFE) 9
Mónika MOLNÁR: *Unika projekto kun konkretaj rezultoj* 15
László SZILVÁSI: *Lingvolernado per danc-tapiŝoj* 20
Intervjuo kun Maximiliano Garcia (Alessandra MADELLA)..... 24
Petr CHRDLE: Mia vivo kun Esperanto (fragmentoj de la libro)..... 27
A. MADELLA *La Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato dekjariĝas* 31
Alessandra MADELLA: *Pri la novaj lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI*..... 34
El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, CN, DE, HU, JP, HR, PL, RS) 36
La fruktoj de agado per unu simpla komputilo (Stefan MacGill)..... 47
Voĉdonu por la retaj ekzamendatoj de KER […] (Katalin KOVÁTS) 48
Leterkesto (reago de Gerald TUCKER)..... 49
Informoj pri ILEI, redakcioj informoj 51
57-a Kongreso de ILEI – Maceió 2024 (alvoko, aliĝilo)..... 52

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo:
57-a Kongreso de ILEI – Maceió 2024 (vd. p.52)

Sur la dorskovrilo: Unika projekto kun konkretaj rezultoj (vd. p.16)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Danke al la virtuala spaco, nun e-istaj aktivuloj ne asociiĝas por ni nur kun iliaj nomoj aŭ maksimume kun iliaj (nigrablankaj – kaj iam ripetataj) fotoj. Feliĉe cifer-erae, ni povas spekti tre bonkvalitajn registraĵojn de iliaj prelegoj en la interreto – kaj se ni estas bonŝancaj ni povas vidi ilin vive kaj eĉ interparoli kun ili „vizaĝ-al-vizaĝe". Tian ŝancon mi trovis antaŭ nelonge pri R. Fössmeier. En sesio de Kunpens(ig)ado pri E-o en Universitatoj li koncize parolis pri io, kion li responde al mia peto, bonvoleme artikoligis por tiu ĉi numero de IPR. En la sesio mi esprimis, ke tio, kion ni revas pri E-o en universitatoj, li kaj liaj gekolegoj efektivigis jardekojn antaŭe! Eble lia nuna artikolo – kunverkite de S. Konnerth – donas al ni bazon por ekscii kiel ni planu kaj agu, por ke tiaj bonegaj agadoj ĉiam pli kal pli disvastiĝu anstataŭ senkoloriĝi kun la pasado de la tempo.

En tiu ĉi numero – fakte same kiel la aliaj numeroj de IPR – ĉiuj materialoj estas ege valoraj, instruaj, kaj inspiraj, tamen bedaŭrinde, mi neniam povas aludi al ĉiuj ili en mia eta spaco ĉi tie! Do pardonpetante de la aliaj karaj kontribuintoj, mi povas diri kelkajn frazojn nur pri unu alia. Temas pri belega omaĝaĵo, kiun verkis D. Keefe pri karmemora A. Casquero. Laŭ mi, tio montras ne nur la grandecon de la ĵus perdita giganto, sed ankaŭ tiun de Dennis mem – kiel vera sekvanto de li. Same kiel Augusto edukis lernantojn kiel J. Camacho, M. Fernańdez, G.C. Fighiera, A. Sikorska kaj multajn aliajn brilantojn, ankaŭ Dennis sindoneme edukas la postan generacion de kapablegaj E-istoj en diversaj landoj.

Bonan legadon!

Ahmad Reza MAMDUHI

Esperanto en la universitato de Sibio inter 1990 kaj 2023

de Sara KONNERTH kaj Renardo FÖSSMEIER

Enkonduko kaj antaŭhistorio

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino ĝis 1990 okazigis sep universitatecajn sesiojn (SUS) por pruvi, ke eblas en Esperanto organizi universitatnivelan studadon. Ĉiuj tiuj sesioj okazis en la Respubliko San-Marino. Provoj ricevi en aliaj landoj ŝtatan permeson pri universitata ekzamenado ĝis tiam ne estis sukcesaj. Nur la rumania klerigministerio en 1985 faris kun AIS interkonsenton pri la ebleco de Esperanto-kursoj ĉe rumanaj universitatoj. Ili tamen ne tuj realiĝis.

Post la falo de la Fera Kurteno en 1989 okazoj pri kunlaboro kun universitatoj en orienta Eŭropo pliboniĝis. En majo 1990 la ŝtata universitato de Sibio (Rumanio; germane Hermannstadt) kaj AIS faris jenan interkonsenton:

> „Por ebligi efikan kunlaboron de la Rumanaj universitatoj kun AIS la unua artikolo de la interkonsento inter la klerigministerio kaj AIS ree …permesas la instruadon de Ilo [= internacia lingvo, Esperanto] kiel filologia studobjekto de la Rumanaj universitatoj kaj ekpermesas kursojn en kaj pri Ilo ankaŭ en nefilologiaj fakultatoj.” [1]

Studado pri „Kibernetika pedagogio” (1990)



La 1-an de oktobro 1990 la universitato de Sibio (ekde 1995: Universitato Lucian Blaga, ULBS) ekproponis studadon pri „kibernetika pedagogio”. Ĉar la kernajn kursojn de tiu fakaro instruis profesoro Helmar Gunter Frank, prezidanto de AIS, en Esperanto, la studentoj devis almenaŭ pasive regi ĉi tiun lingvon. Tion fari

kadre de la universitato permesis la ĉi-supra interkonsento. La unuaj kursblokoj en tiu studado estis pri kibernetiko, kibernetika pedagogio, kibernetika psikologio kaj tekniko de komunikiloj. Parto de ĉi tiuj kursoj estis en la instru-taskaro de Otto Stamp, vicministro en la instruministerio.

Inter la 7-a kaj la 11-a de oktobro 1991 okazis la unua rumana SUS en Sibio, kunlabore kun la universitato de Sibio. Tiel la studentoj povis sperti la praktikan uzon de Esperanto ekster siaj kursoj. En tiuj sesioj partoprenis multaj studentoj (350 atestoj je la 9-a sesio en 2001), ĉar ili povis akiri tie „studunuojn" agnoskeblajn dum la sekva studjaro. La plejmulto de tiuj kursoj estis en Esperanto. Por multaj filologoj la lernado de Esperanto estis sufiĉe interesa sperto. S. Konnerth ankaŭ partoprenis kun gestudentoj de la filologia fakultato en studadsesioj en Komárno (SK).

Organize la nova studplano renkontis kelkajn obstaklojn. Kiam en januaro 1993 prof. Frank pro malsano ne povis instrui, bonŝance Sara Konnerth, esperantistino kaj AIS-anino, povis aniĝi en la universitato kaj transpreni la instruadon. Sed la nova fako „kibernetika pedagogio", kiu ja estu komplemento al la tradicia pedagogio, formale estis enkadrigita en ĉi-lastan kaj ne plu ekzistis kiel memstara fako. La Esperanto-kursoj aperis en la diplomoj sub la nura nomo „fremda lingvo".

Komencante en 1994 S. Konnerth organizis – unu- aŭ du-foje en la studjaro – en la Fakultato de Filologio internaciajn AIS-konferencojn, la tiel nomatajn „Rumanajn Studadsesiojn". Ili okazis ĝis la jaro 2007. Dum tiuj sesioj la pliparte eksterlandaj docentoj prezentis en Esperanto diversfakajn kursojn por studentoj.

Studado pri „Internacia komunikado" (1994)

Komence de oktobro 1994 Konnerth ricevis postenon por instrui informadikon en la nova sekcio de „Lingvoj modernaj en apliko" de la Fakultato de Filologio. Ĉi tie Frank kaj aliaj AIS-anoj povis instrui – kun traduko – al tiu sekcio speciale la fakon: „Internacia komunikado", elekteblan fakon por la studentoj de la sekcio. Esperanto estis instruata per fakultativa kurso por la studentoj de ĉiuj sekcioj de la tiama filologia fakultato, kun sekcioj por la rumana, angla, germana kaj franca lingvoj. Ekzistis ankaŭ la eblo studi fakultative ĉi tie la komplementan studadon pri „aplikata informadiko", kie estis instruataj ankaŭ kelkaj kursoj en Esperanto.

Instruado de „didaktika personaro” (2000)

Ekde la komenco de la jaro 2000 prof. Frank ne plu instruis en la psikologia fakultato. Sed en la sama jaro estis fondita la „Departemento pri la instruado de didaktika personaro” *(Departamentul pentru pregătirea personalului didactic = DPPD)* gvidata denove de Conf. d-ro Alexandru Hudiţean, kiu antaŭe estis la gvidanto de la psikologia fakultato. Li ebligis al prof. Frank instrui la tiam por la studentoj elekteblan fakon „Komputile asistata instruado” *(IAC = Instruire asistată de calculator)* [2], kie Frank instruis en la germana lingvo por la gestudentoj de la ĝermanistika sekcio kaj en Esperanto – kun traduko de Sara Konnerth – por aliaj. Frank faris la kursojn pere de intensaj semajnaj kursoj kaj Konnerth la seminariojn en ĉiu semajno dum la semestro = 14 semajnoj. IAC estis elektebla fako en la „pedagogia bloko” (modulo), kiu estis deviga por ĉiuj studentoj, kiuj volis instrui en iu lernejo iun fakon – kutime po ĉirkaŭ 600 studentoj en studjaro elektis fari ĉi tiun blokon.

Renardo Fössmeier instruis en Sibio ekde decembro 2002. Partoprenis en decembro 2002 ĉirkaŭ 60 filologi-studentoj de la fakultativa kurso pri aplikata informadiko en la ekzameno de E-o pri la „Enkonduko en la datenprilaboradon”. En la sekvaj semestroj li faris duagradan kurson pri la sama temo, pri uzo de Interreto, pri kodado de bildoj en komputiloj kaj pri maŝina tradukado. Radojica Petrović faris, same en Esperanto, kurson pri la aplikado de datenaroj, laŭ la ekzemplo de MS Access, por ne-informadikistoj. François Simmonet faris kurson pri franca kulturo (kadre de la kurso „Internacia komunikado”), franclingve por la studentoj de la franca sekcio kaj en Esperanto por studentoj, kiuj antaŭe partoprenis en la fakultativa kurso pri Esperanto.



Ĉiuj ĉi kursoj funkciis, inkluzive de ekzamenoj, sufiĉe bone, kvankam la studentoj havis nur kelkmonatan scion de Esperanto. Eble helpis, ke plimulto havis latinidan gepatran lingvon, la rumanan.

En februaro 2003 – dum la 13-a Rumana Studadsesio – estis fondita la Departemento Akademia Internacia pri Sciencrevizio, Universitat-Pedagogio kaj Eŭrologio en la fakultato pri filologio kaj teatro de ULBS. Inter la jaroj 2003 – 2006 funkciis kadre de tiu Departemento la magistriĝstudado „Interlingvistika kaj interkultura eŭropa studado”. Tie la plejmulto de la kursoj estis instruataj en E-o. La studentoj partoprenis ankaŭ en kursoj dum la studadsesio SUS 28 en Karlovo (en 2005), kie S. Konnerth prezentis prelegon pri „Studado pere de AIS en la universitato de Sibio”.

Kadre de tiu magistriĝ-studado instruis en Esperanto jenaj AIS-anoj: Barandovská-Frank, Frank, Fössmeier, Leonov, Lobin, Maksimova, Polakova, Quednau, Simonnet, Wickström. Du sibi-aj profesoroj faris kursojn en la rumana. Enkondukan kurson pri Esperanto, en la rumana, faris Maria Butan.



Festaĵo okaze de la inaŭguro de la Departemento Akademia Internacia pri Sciencrevizio, Universitatpedagogio kaj Eŭrologio de la Fakultato pri Filologio kaj Teatro. En la unua vico staras: Gerhard Konnerth, Pamfil Matei, Hans-Dietrich Quednau, Dumitru Ciocoi-Pop, Helmar Gunter Frank, Carlo Minnaja, Fabricio Angelo Pennacchietti; dorse staras la vicrektoroj de la ULBS.

En la jaro 2006, post la malsaniĝo de prof. Frank, Konnerth transprenis la instruadon de IAC en la DPPD kaj ne plu instruis en la filologia fakultato. Tial ŝi ekde 2007 ne plu organizis studadsesiojn, sed nur „sciencajn sesiojn" en Sibio kun sciencaj prelegoj kaj Esperanta sekcio. La lasta iom granda evento organizita de Konnerth en Sibio estis la aranĝo de SUS 32 en septembro 2011.

Nun en la jaro 2023 nur unu Studadplano de ULBS enhavas la eblon instrui Esperanton kiel fakultativan fakon en la oferto de „Fremdaj lingvoj" (la mencio de „Esperanto" malaperis) dum la tria studjaro. Tio estas la plano por la instruado de estontaj instruistoj de infanvartejo aŭ de la lernejaj klasoj 1 – 4 kun germana instrulingvo. Por tiuj studentoj Konnerth instruis Esperanton kiel „fremdan lingvon" lastfoje en la studjaro antaŭ la pandemio de Kovim 19 (do 2018 – 2019). Dum la pandemio fakultativaj kursoj ne okazis. Nun Konnerth estas en pensio kaj ne plu povas instrui fakultativajn fakojn.

Konkludo

Dum ĉirkaŭ 20 jaroj, inter 1990 kaj 2010, la ŝtata universitato de Sibio prezentis kunlabore kun AIS San Marino diversajn studprogramojn, en kiuj eksterlandaj AIS-docentoj instruis rumanajn studentojn, kiuj lernis Esperanton dum kelkmonata kurso. Malgraŭ administraj obstakloj, kiuj malebligis unuecan programon tra la tuta tempo, ĉi tiuj studprogramoj estis enhave kaj organize sukcesaj kaj havigis al la koncernaj studentoj ne nur scion ne alimaniere haveblan, sed ankaŭ studpoentojn resp. diplomojn.

Referencoj

[1] Diana Mihăescu (kompilanto / coordinator): Omaĝlibro. 10 jaroj da klerigkibernetiko en „Lucian Blaga"-Universitato Sibiu. Eldonejo Psihomedia, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Universitatea „Lucian Blaga" Sibiu, 2003.

[2] Konnerth, Sara: Modeloj de komputil-asistata taksado (Modelle der rechnerunterstützten Bewertung). En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft, vol- 53 (1), Akademia Libroservo, Paderborn (Germanio), 3–18, 2012.

Augusto CASQUERO, 1945 – 2023

Nekrologo verkita de Dennis KEEFE, la 31-an de oktobro, 2023

En la panteono de elstaraj instruistoj de Esperanto certe troviĝas inter la ĉefaj, honoraj lokoj, nia simpatia, amuza sed serioza Augusto Casquero de la Cruz, kromnomata en Ĉinio la fluganta, hispana instruisto. Kiamaniere li iris de unu landoparto al alia, ĉu fluge aŭ alimaniere, mi ne scias, sed mi neniam forgesos la unuan tagon, kiam mi ekkonis Auguston en Madrido, strato Atocha, numero 98, etaĝo 4 en la tiel nomata Liceo de Esperanto. Estis ĝuste Augusto, kiu konvinkis min aliĝi al mia unua kurso de Esperanto, antaŭ 43 jaroj en Madrido.



Augusto naskiĝis la 31-an de januaro en la urbo Plasencia, regiono Caceres, en Hispanio. Li forpasis la 19-an de septembro, post multjara malsano kaj kompleta, tragika memoro-perdo, en alia hispana urbo, Valencio, kie familianoj, geamikoj kaj esperantistoj adiaŭs lin en funebra ceremonio nur 24-horojn poste. Jam posttagmeze, la 20-an de septembro, Augusto ne plu estis inter ni.

Dum sia tuta vivo, la menso kaj koro de Augusto ĉiam restis ĉefe en unu sfero, tiu de lernado kaj instruado. Li ĉiam provis legi, lerni, studi; li ĉiam klopodis apliki ĉion, kion li lernis por la solvo de homaj defioj. Unue, en la mondo de instruado, kaj due en la mondo de agado. Scivolema, lernema, kaj antaŭ ĉio, instruema kaj societema, tia estis Augusto. Kaj amuza: tipa esperantisto diras „saluton," Augusto diris „SALATON!"

Tamen io, kio ne komplete klaras en lia vivo-itinero, estas lia aliĝo al la hispana armeo en la fruaj jaroj de sia kariero. Kiel ĉiuj hispanaj junuloj tiutempe, li devige militservis, sed ĝuste kial li daŭrigis en tiu kampo estas mistero, speciale kiam vi prikonsideras lian pacaman koron kaj lian postan vivon en Esperantujo. Tamen, eĉ en la armeo oni klare komencis vidi lian emon ĉiam lerni kaj ĉiam instrui.

Augusto rapide elstaris en la armeo, kaj same rapide iĝis oficiro kun posteno en Norda Afriko, en la hispana kazerno de la urbo Melilla. Tie rimarkite pro sia talento, li estis elektita ricevi specialan lingvo-trejnadon en Usono en 1973. Dum kvar monatoj tie, Augusto studis la anglan lingvon kaj poste telekomunikadon per mikro-ondoj. La rezultoj estis bonaj, kaj Hispanio poste sendis Auguston al la ŝtato New Jersey en Usono por ricevi pluan trejnadon, ĉi-foje, kiel instruisto en la armeo.

La armeo estis ne nur lia loko de teknika trejnado, sed ankaŭ de lingvo-lernado. Mi jam menciis lian angla-lingvan sperton en Usono; en Hispanio, en lernejoj de la armeo li povis studi aliajn lingvojn: la germanan, la rusan. Kaj krom tio, ekstere, li ofte vizitadis la Oficialan Lernejon pri Lingvoj en Madrido por daŭre lerni lingvojn. Li iĝis poligloto. Militisto? Se fotisto sekvus Augusto-n dum tiuj jaroj, probable en la fotoj vidiĝus lingvo-libroj, ne pafiloj!

Feliĉe por ni, dum Augusto libertempis en Valencio, en 1969, li legis iun anoncon en la loka gazeto pri senpaga kurso de iu lingvo nomata Esperanto. Scivolema, kiel denaska lernemulo, Augusto decidis ĉeesti la kurson, kaj ne nur. Li invitis siajn gefratojn ĉeesti kun li. Imagu la unuan lecionon de Esperanto: Augusto, tri fratinoj kaj unu frato! Ili ĉiuj lernis Esperanton kune, kaj 12 jarojn poste en Madrido esperantistoj ankoraŭ ofte vidis unu aŭ du el la gefratoj ĉeesti Esperantajn eventojn, ĉiam kun Esperanto en siaj konversacioj. Konante Auguston, mi supozas, ke li daŭre instigis familianojn praktiki Esperanton, kaj ni scias, ke en tiuj jaroj li komencis instrui Esperanton al kolegoj en la armeo, kaj en Hispanio kaj en Usono.

Dum siaj armeaj jaroj, en la lasta parto de la sepdekaj jaroj, Augusto ludis

centran rolon, kune kun sia koramikino, poste edzino, Alicia en la Liceo de Esperanto. Laŭ mia memoro, ili loĝis proksime de la Liceo kaj povis facile atingi ĝin piede, kio certe influis en la vigla disvolviĝo de la madrida grupo. Kun tiu dediĉita paro da esperantistoj, estis ĉiam iu en la Liceo por bonvenigi homojn de Madrido, kiuj interesiĝis pri Esperanto kaj kiuj eventuale lernos ĝin en unu el la multaj kursoj tie. Tiel okazis al mi: en marto 1980 mi estis lernanto de la hispana lingvo en la Universitato Complutense de Madrido: hazarde mi vidis afiŝon pri kurso de Esperanto ie en la centro de la urbo. Mi iris al la Liceo, kaj, kiel dirite, Augusto konvinkis min aliĝi al la kurso. Farite.

Dum tiu periodo, Augusto kaj Alicia estis la motoro de la movado en Madrido. La Liceo pozitive revoluciiĝis dum tiu tempo, de pasiveco al aktiveco, parte ĉar ili kapablis bonvenigi talentajn, lernemajn esperantistojn. Speciala kazo de tio estis la alveno de Pedro Villaroig, poste instruisto de Esperanto (mia, ankaŭ), kaj Juan Carlos Ruiz, ambaŭ iĝis elstaraj akademianoj, universitataj profesoroj pri fiziko kaj pri inĝenierado, kun dekoj da sciencaj artikoloj kaj libroj. Augusto sciis, kiel konservi tian talenton en la Liceo kaj tio gravis por la loka movado.

La Liceo en la epoko de Augusto estis bolanta poto de altnivela agado, kaj tie multaj esperantistoj daŭre lernis la lingvon kaj lernis verki: Jorge Camacho, Miguel Fernańdez, Gian Carlo Fighiera, Ada Sikorska, Ana Montesinos, Francisco Javier Moleón, Pedro Garrote, Pilar Menéndez (poste en Norvegio), Angel Sancho, Pedro Villaroig, Juan Carlos Ruiz kaj mi mem, Dennis Keefe. Kaj oftaj gastoj de eksterlando kiel Liven Dek, Duncan Charters.

Augusto influis nin ĉiujn, kaj ĉu ni lin? Ĉiaokaze la Liceo de Esperanto de Madrido kun Augusto kaj Alicia kune kun tiaj elstaraj homoj estis unu el la plej bonaj lokoj en la mondo por kreski Esperante.

Augusto vere amis instrui, ĉu kompensate ĉu ne, kaj li instruis tiom da kursoj en Madrido, ke nur eblas diri, ke tiumomente, en la fruaj okdekaj jaroj, ĉiumonate alvenis al la Liceo dekoj da homoj interesataj pri Esperanto. Kursoj komenciĝis ofte, kaj kutime kun plenplena lerno-ĉambro de 35 gelernantoj. Tiaj cirkonstancoj timigus multe da novaj Esperantaj kursgvidantoj, sed por Augusto povi instrui en tiaj cirkonstancoj estis granda plezuro. Augusto estis la kursgvidanto de ĉiaj kondiĉoj.

Sed instruado de Esperanto estis nur parto de la verda vivo de Augusto. Li ŝatis agi, fari, organizi. En 1980, li organizis diversajn aspektojn de la Liceo: li kontaktis amaskomunikilojn, li petis subvenciojn, vizitis la

ministerion pri kulturo. Mi memoras, ke unufoje li revenis de unu el tiaj rendevuoj, kaj dum la fama, ĉiusemajna Konversacia Rondo regule ĉeestata de 20, 30, 40 esperantistoj, li subite elpoŝigis 50 000 pesetojn, levis ilin super sian kapon kaj fiere diris: „Jen nia subvencio por la Liceo de Esperanto!” Tio estis alia talenta flanko de Augusto: li sciis kiel klare, amuze eĉ ŝoke komuniki.

Lia talento komuniki helpis al ni starigi literaturan konkurson en la Liceo en 1981. Kaj menciindas la Internacia Seminario pri Sportoj en 1982, la tuto en Esperanto, kaj kun la aprobo kaj beno de la Ministerio pri Kulturo: 150.000 pesetoj kaj subteno de la reĝo Juan Carlos de Hispanio. Kompreneble, tiaj kapabloj de Augusto kondukis lin al multe da postenoj en Esperantujo, ekde la prezidanteco de la Madrido Esperanto-Liceo, tamen Augusto ne vere ŝatis esti estro de io ajn. Li ŝatis agi, fari. Ĉu intelekte modesta? Ĉu socie timema? Agado kaj farado kun ia rekono, tio jes, sed prefere kun malpli da oficialaj diplomoj, kaj kun pli da rekono kaj kafo. Jes, kafo. Augusto tre ŝatis babili kafeje. Prefere agnosku la atingojn de Augusto per kafo kaj amikeca konversacio, ne per paperoj, nek per tro da oficialaj laŭdoj.

En la madridaj jaroj, la emo studi kaj lerni instigis Auguston forlasi la armeon kaj komenci dediĉi sin plene al studado pri edukado. Unue li diplomiĝis pri infana edukado en la Universitato Complutense de Madrido. Lia subfako? Angla filologio. Poste li diplomiĝis pri speciala edukado kaj iĝis instruisto de logopedio, tio estas, helpanto de homoj, kiuj havis problemojn, psikajn aŭ fizikajn, bone paroli, elparoli sian denaskan lingvon. Estas iom ironie, ke Augusto mem, ofte parolante fulmorapide, ne tiom zorgis pri sia propra akĉento en Esperanto, kion la ĉinoj kaj aliaj en postaj jaroj rimarkis. Tamen, kiel klare aŭdeblas en registraĵoj, ekzemple, en lia alparolado al la Kongreso de Esperanto en Valencio en 1993, li povis paroli tute klare, bone eligante ĉiajn vokalojn kaj konsonantojn de la lingvo. Eĉ modelo de prononcado, SE li volis.

Augusto, la eterna lernanto, ne haltis tie en siaj jam longaj universitataj studoj. Jardekon poste en Valencio, li sekvis doktoriĝan diplomon pri edukado, farante ĉion krom la lasta parto: la doktoran disertacion. Tamen, li verkis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj faris lerno-eksperimenton en loka valencia lernejo, instruante al la infanoj unue Esperanton, kaj poste, mi kredas, la anglan. Indus trarigardi lian laboron pri tio kiel Esperanto lernfaciligas la akiron de dua lingvo, tamen mi ne scias, kie troviĝas lia disertaĵo.

La rilatoj inter la Universitato de Valencio kaj Augusto estis bonaj. Tiel, poste, Augusto petis de ili aldoni oficialan, porkreditan kurson de Esperanto en la fako pri filologio kaj tiel ili faris. Augusto instruis tiun tre popularan kurson dum 6 jaroj. Pro tiu sukceso, estis iam espero en Hispanio, ke ankaŭ aliaj universitatoj, sekvante la ekzemplon de Valencio, enmetos kursojn en la oficialan programaron, sed bedaŭrinde, tio ne okazis, ne en ĉeestaj universitatoj. La kursoj de UNED estiĝis, sed dudek jarojn poste. Tamen aparte sciu, ke en Valencio, en la unuaj el tiuj ses jaroj de Esperanto, la kurso furoris: en la unua kurso, ekzemple, la aliĝo-periodo de 90 tagoj tute ne bezonatis, ĉar post nur kvar tagoj la kurso de Esperanto estis jam plenplena kun 50 studentoj. Granda sukceso en la historio de Esperanto. Estis pli da studentoj, kiuj volis eklerni Esperanton ĉe la universitato inter 1998 kaj 2004 ol sidlokoj en la klasĉambro.

Spite al tiu sesjara universitata sukceso en Valencio, la pasio de Augusto por Esperanto, lernado, instruado kaj spertado de novaj situacioj refoje altiris lin al foraj landoj kaj li decidis dediĉi sin al nia lingvo aliloke. Dum tiuj restadoj en aliaj mondopartoj Augusto, ĉiam pasie pri lernado, provis akiri ĝis certa grado la lingvojn de la regionoj, kie li loĝis kaj laboris. Unu jaron en Slovakio, en Poprad; kvin jarojn en Pollando en Bydgoszcz. Kvar jarojn en Ĉinio en Kantono, kaj eble unu jaron en Vjetnamio. Tiel li akiris iom el ĉiu lingvo.

Estis Pollando kaj Ĉinio, kiuj plej tuŝis Aŭguston. Li ĉiam diris, ke li amas Pollandon pro tio, ke la poloj kaj la hispanoj similas: gastamaj, simpatiaj, sinceraj. Kaj li diris preskaŭ la samon pri Ĉinio. Li eĉ verkis artikolon por la revuo *Esperanto* titolitan: „En kio similas Hispanio kaj Ĉinio?" Respondo: en multo! Augusto tre ŝatis la viglan strato-vivon de Ĉinio, la homajn rilatojn, kio tiom memorigis al li Valencion, Plasencion, Madridon. Kaj la manĝojn. Sed sciu, ke Augusto ankaŭ tre ŝatis prezenti ĉion hispanan, ĉie en la mondo kie li loĝis. Kelkfoje per prelegoj, kaj ofte per sia kuirado: homoj tra tuta Eŭropo kaj multaj landoj en Azio spertis la famajn hispanajn rizaĵojn, paeljojn, kuiritajn de la manoj de li. Augusto la ambasadoro de la hispana kuirarto.

En Pollando Augusto instruis Esperanton kaj la hispanan lingvon en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK). Tio, kion li faris tie, meritas plian atenton: Augusto unue instruis Esperanton al la studentoj, kaj poste, per Esperanto, li instruis la hispanan lingvon. Ofte por fari tion, li utiligis hispanan modernan muzikon, tradukante, elektante specialajn vortojn aŭ frazojn por plua studo. Ankaŭ en Ĉinio li instruis

Esperanton kaj la hispanan ĉe universitato en Kantono, en la suda parto de Ĉinio, kune kun la helpo de la ĉina profesoro Liu Weizhuang. Kursojn de Esperanto li ankaŭ prezentis en la Esperanto-Asocio en la 21-a etaĝo de 30-etaĝa nuboskrapulo, tipa en la ĉinaj urbegoj.

La ĉina sperto de Aŭgusto estis profunda: prelegoj en universitatoj kaj Esperantaj asocioj, ĉeesto de la Landa Kongreso en Nankino, instruado eĉ en budhana monaĥejo nomata Duobao Si, kun la Esperanto-parolanta monaĥo Miaohui, en la urbeto Sanmen, ne malproksime de Ŝanhajo. Tie li prelegis interalie pri didaktiko, kaj oni povas imagi la efikon de tia informado sur 100 monaĥoj, kiuj ĉiam restis inter la muroj de la monaĥejo mem! Sed la plej granda partopreno-evento en Ĉinio estis la Lingvaj Festivaloj de Ĉinio. Augusto, kune kun Michel Fontaine de Francio kaj Peng Zhengming de Ĉinio instruis Esperanton al pli ol 1400 ĉinoj en la dua semajno de majo 2008. Ĵurnalistoj abundis ĉe la Festivalo, kaj Augusto vidiĝis tra la tuta lando en la ĉina televido, kiel ĉiam simpatia, amuza kaj tre komunikema. Li salutis ĉine, kaj parolis Esperante.

Por multe da Esperantistoj kaj ILEI-anoj io mankas en la supra rakonto pri la vivo de Augusto. Mi ne scias, ĉu Augusto konsentus kun vi kaj eble al li ne tiom plaĉas, ke mi kompletigu nian memoraĵon pri li per la sekvo. Honorojn li ne tiom ŝatis. Tamen, ek. Ni faru!

Augusto estis la prezidanto de la LKK de la UK Valencio 1993. Li fariĝis la prezidanto de la grupo de Esperanto de Madrido, de Valencio, de la tuta Hispanio en HEK, plurfoje, ne dezirante tion, sed farante, se iu alia ne prezentiĝis por plenumi tiajn prestiĝajn taskojn. Li estis Komitatano de UEA. Augusto estas en la Panteono de elstaraj instruistoj de Esperanto de Edukado.net. Li gajnis tri literaturajn premiojn, du en Esperanto, unu en la valencia. La ricevis la unuan premion Ada Sikorska, kaj pri tio li certe ŝatus, ke ni menciu. Alicia, siaflanke, ricevis la premion Klara Silbernik – kaj tion certe Augusto ŝatus, ke mi menciu: sen Alicia, eble sekve sen Augusto en Esperantujo!

Li verkis dekojn, eĉ centojn da arikoloj kaj diverspecajn anoncojn, tamen neniam verkis libron, bedaŭrinde. Post ĉio ĉi, li pluvivas en la hispana traduko de la *Esperanto per la Rekta Metodo* de Stano Marček. Kaj Augusto akiris subvenciojn por publikigi Esperantajn librojn, ekzemple, la antologion de la valenciano Miguel Hernández, *Poeto de l' popolo*, tradukitan de la esperantisto Miguel Fernández. Li ricevis diplomon pri elstara agado de UEA. Li estis vicprezidanto de Monda Turismo. Kaj li posedas ankoraŭ

aliajn, ne supre menciitajn, sennombrajn diplomojn pri studoj ene kaj ekstere de la Esperanto-Movado. En tute alia fako, li partoprenis, kurante, en pluraj plendistancaj maratonoj en Madrido. Li vizitis 47 landojn, kaj por fini, lia plej ŝatata libro estas *Don Kiĥoto*, parte ĉar la vaganta kavaliro Don Kiĥoto memorigas lin pri multaj idealistaj esperantistoj, kaj ankaŭ pri li mem: Augusto, la eterna, scivolema lernanto kaj instruanto de ĉiuj kaj antaŭeniganto de Esperanto. Augusto, la fluganta, hispania instruisto – kaj eterna lernanto. Ĝis revido, kara Augusto! Kondolencoj al Alicia, liaj gefiloj kaj familianoj, kaj al ni, esperantistoj.

Unika projekto kun konkretaj rezultoj

de Mónika MOLNÁR (Svislando / Hungario)

La 6-an de majo 2023, dum sia Malferma Tago, la Lernejo de La Granda Ursino festis siajn 40 jarojn. Temas pri tiu eta, svisa lernejo, kies pedagogia linio sekvas la spurojn de Célestin Freinet, franca pedagogo. Nia asocia lernejo havas baze alian funkciadon ol la publikaj lernejoj, sed nun ni menciu nur la fakton, ke en ĝi ĉiuj gelerantoj lernas Esperanton, kiel devigan studobjekton. Spite al la supozo de pluraj esperantistoj, la devigo ne vere influas la sintenon de la gelernantoj, kiuj ŝatas kaj plezure lernas Esperanton tra la multaj, variaj aktivaĵoj proponitaj de mi (ilia instruistino) aŭ de ili mem. En nia repertuaro troviĝas multaj ludoj, prelegetoj, skeĉoj, teatraĵetoj kaj marionetaj spektakletoj, kamiŝibajoj (bild-teatroj), sciencaj eksperimentoj, komunaj kuiradoj, korespondadoj, infanrakontoj kun propraj ilustraĵoj (el kiuj kelkajn vi povas vidi kaj legi regule en mia rubriko, LUDE de *Juna Amiko*), kanto-tekstoj, kantadoj kaj ankoraŭ multaj aliaj aktivecoj.

Loko mankas por ĉion detali, do ni koncentriĝu pri la plej lasta granda kaj unika projekto, kiun ni ellaboris kaj realigis parte dum la Malferma Tago kun la konata kaj ŝatata muzikgrupo, Kajto. La ideo de tiu ĉi projekto naskiĝis antaŭ tri jaroj, sed pluraj faktoroj (homaj kaj kovidaj) malebligis la realiĝon tiam. La vera projekto komenciĝis iam en decembro 2022 per kreado de kanto-tekstoj fare de la kvar plej aĝaj gelernantoj de la lernejo. La junuloj libere kreis siajn tekstojn, kiujn mi korektis, reviziis kaj al kiuj mi proponis modifojn por ke ili konvenu al kantotekstoj. Kiam la junuloj akceptis miajn modif-proponojn, mi sendis la tekstojn al Kajto. Nanne eklaboris por komponi melodiojn al tiuj kvar tekstoj, kaj kvankam li ne havis facilan laboron, li tamen sukcesis krei kvar mirindajn melodiojn laŭ la senditaj



tekstoj. Intertempe, ĉiuj gelernantoj de la lernejo ekkonatiĝis kun la tekstoj kaj komencis parkerigi ilin. Post tiu etapo Nanne registris la novnaskitajn kantojn kun la voĉo de Ankie, kaj sendis ilin al mi, kiu pludonis la kantitajn versiojn al la gelernantoj. La malkovro de la melodioj estis plena je emocioj. Ĉiuj estis ravitaj de la kantoj. La daŭrigo de la parkerigado fariĝis pli facila kantante la tekstojn por ke tiu parto iru jam glate kiam alvenos niaj gastoj, Ankie kaj Nanne, unu semajnon antaŭ la Malferma Tago, ĉar jes, ankaŭ tio estis parto de la projekto. La infanoj, kiuj lernas Esperanton de unu-du aŭ pluraj jaroj, kapablas sufiĉe bone kompreni kaj paroli ĝin (la plej lertaj eĉ trapasas regule KER-ekzamenojn je B1 kaj je B2 niveloj post sia 14-a jaraĝo). Sed ĝuste tiam ni havis du novulojn… Unu komencis la lernejon - kaj do E-on - ĉe ni nur du semajnojn antaŭ la alveno de Kajto kaj la alia eĉ ne du tagojn antaŭe, do ĉi-lasta konis absolute nenion pri la lingvo, pri la kantoj, pri io ajn. Tiam ni pensis, ke ni lasos lin fari kion li kapablas kaj ni adaptiĝos al la situacio por ke li ne sentu sin ĝenata. La antaŭvidita problemo montriĝis superflua timo, ĉar la knabo tre rapide lernis la kantojn en tiu nekonata lingvo kaj povis plene partopreni en la koncerto semajnfine. Jen plia pruvo pri la potenco de kantoj en la lingvoinstruado, pri kiu mi ekde ĉiam estas intime konvinkita.

Nu, vi jam povis diveni la sekvan etapon, nome ke komence de majo 2023 Kajto venis en nian lernejon kaj ili persone dediĉis sin kun la infanoj por ke nia projekto havu kiel eble la plej grandan sukceson! Ili vojaĝis 1800 km-ojn (900 tien-reen) el Nederlando kun siaj muzik-instrumentoj, son-sistemoj, alportante ankaŭ siajn entuziasmon kaj bonhumoron al la infanoj, kiuj ege aprezis kaj ĝuegis ĉion. Dum kvar tagoj ili venis ĉiutage en la lernejon por kanti kun la gelernantoj niajn kvar kantojn kaj instrui al ili kelkajn ankaŭ el sia repertuaro. Kelkaj estis jam konataj de la pli aĝaj gelernantoj, kelkaj tute novaj, sed ĉiuj entuziasme kunkantataj. Ili tiom bone progresis, ke merkrede kaj ĵaŭde okazis jam eĉ registradoj de la kantoj fare de Nanne, per lia profesia sonsistemo. La infanoj ne sciis ekzakte por kio ni re- kaj reregistras la kantojn, ni ne vere diris tion al ili, sed kompreneble ili havis siajn supozojn, kiuj donis siaspecajn spicojn al la tuto. Vendrede ni aldonis ankaŭ frapinstrumentojn, per kiuj la gelernantoj akompanis la refrenon de „Procesio multkolora”. Sabato estis la granda tago, la malferma tago kun

speciala programo por la 40-a datreveno de la lernejo. Kajto kolorigis kaj vigligis la matenan oficialan parton komence en duopo kaj poste parte kun la infanoj. Ili same procedis dum sia posttagmeza koncerto, kie plurajn kantojn ili prezentis kune kun la infanoj, interalie la kvar kantojn, kiuj ekestis el la kunlaboro de nia lernejo kun Kajto. Ambaŭ partoj havis belan kaj meritatan sukceson kaj la tagon partoprenis ankaŭ iamaj lernantoj, gepatroj, parencoj kaj grupo da svisaj esperantistoj. Ni restas ege dankemaj al Ankie kaj Nanne por tiuj kune pasigitaj mirindaj tagoj.



La eksterordinara kunlaboro kun Kajto donis ankaŭ tre belajn momentojn por babiladoj, ideo-interŝanĝoj kaj mi ŝatus kundividi kun vi la personajn impresojn de Ankie kaj Nanne pri tiu ĉi unika projekto, en kiu ili ludis ĉefrolon:

„Ni tre aprezis ĉi tiujn 5 labor-tagojn en la lernejo de La Granda Ursino kun la lernantoj kaj kun Mónika kaj Anke (la du ĉefaj instruistinoj kaj lernej-gvidantoj), kaj ni tre aprezis la principon de la lernejo. Estis bonege, granda, granda plezuro!

Kio estis la plej bela momento? Hm, malfacilas diri, ĉar ĉiu momento estis bona! Estis tro da bonaj momentoj por povi elekti iun specifan momenton... Sed se ni vere devus elekti iun precizan momenton... tio eble estus la vendreda mateno, dum la ĝenerala provludo, kiam ni vere sentis,

kiom la gelernantoj estis engaĝitaj: ili kantis ĉiujn kantojn parkere, kiel Mónika kaj Anke petis tion de ili. Kaj ili ĉiuj konis vere ĉiujn kantojn parkere! Gratulon al la gelernantoj de La Granda Ursino! Ankaŭ la Malferma Tago estis tre bona! Ni sentis tre bonan sindediĉon de la gelernantoj kaj bonan sinergion kun la publiko. Ankaŭ la kontakto kun la gepatroj estis tre bona. Ni vere estas tre kontentaj pri la tuta semajno!!

Ĉu io frapis nin en ĉi tiu lernejo, kio povus esti nekutima aliloke? Jes, certe, eĉ pluraj aferoj, sed tio, kion ni eble plej elstarigus, estis la fakto, ke por ni en ĉi tiu lernejo ĉio estas en rilato kun ĉio! Ĉio estas konektita! Temas pri unueco. Ekzemple, la kuirado havas rektan ligon kun matematiko ktp. La lernantoj havas multajn eblojn por moviĝi. Dum la tago ili havas sufiĉe da tempo, por elspezi sian energion en la freŝa aero de la ĝardeno! Se ni havus 20-25 jarojn, ni ŝatus kandidatiĝi por povi labori en tiu ĉi bela lernejo!! Labori en ĉi tiu lernejo ne estas nur laboro... ĝi estas vivmaniero. Por tio necesas grandaj edukaj, sociaj kaj administraj kapabloj. En Mónika kaj Anke ĉi tiuj kvalitoj ĉeestas, kaj ili estas subtenataj de la aliaj instruistoj kiuj laboras en tiu ĉi lernejo. Ni havas grandan admiron por 'La Grande Ourse'!!" - Ankie kaj Nanne de Kajto.

La projekto poste disvolviĝis iom silente, sekrete en la manoj de Ankie kaj Nanne, kaj ni povis malkovri ĝian sekvan paŝon al la publiko dum la UK en Torino. Tie mi prelegis pri tiu ĉi projekto, kaj Kajto aktive partoprenis mian prelegon prezentante vive la kvar kantojn de la gelernantoj kaj anoncante la novaĵon, ke ili troviĝas sur la ĵus eldonita naŭa KD de Kajto, kiu titoliĝas „Sen timo". Cetere, gelernantoj el la jaro 2020 same partoprenis en la kantado de la refreno de la titoldona kanto! Do, vi povas vidi, ke nia kunlaboro komenciĝis jam multe pli frue ol tiu ĉi nuna projekto.



Por transdoni al vi ankaŭ la pensojn de la gelernantoj, jen kelkaj fragmentoj el iliaj projekt-priskribaj tekstoj:

„Por mi la semajno estis vere granda kaj bela eksperimento, kiu estis tre diversa ol kanti en la franca, ĉar ni kantis ne nur por la publiko, sed ankaŭ por ni mem. Mi esperas, ke foje mi povos revidi Kajton, ĉar Nanne estas tre amuza kaj Ankie estas tre bela kaj tre ĝentila." - Olga, aŭtorino de la kanto „Arbare".

„Tagon post tago ni pliboniĝis kaj ni eĉ registris la kantojn. Ankie kaj Nanne estis vere agrablaj, do mi tre, tre ŝatis labori kaj kanti kun ili. Ili nomiĝas Kajto, ĉar por Nanne la kajto estas simbolo de paco. Mi dankas ilin pro ilia veno.” - Eloïse, aŭtorino de la kanto „Survoje”.

„Dankon por ĉio kaj ankaŭ por la KD, kiu estas en la aŭtomobilo por aŭskulti ĝin dum niaj familiaj vojaĝoj. Mi esperas ke ili povos reveni ĉar tiu eksperimento estis vere bona, ke ni povis kanti kun muzikistoj en Esperanto! Mi pensas ke estis mia plej bona kanto-semajno en Esperanto. Estas vere, ke ĝis nun ĝi estis mia sola tia semajno, sed certe la plej bona, kiun mi faris en mia vivo, ĉar mi scias ke eĉ se mi refarus unu alian kanto-semajnon en Esperanto, ĝi ne povus esti pli bona ol tiu ĉi semajno. Kaj nun ni atendas alian fojon por ke ni povu reparoli kun ili. Dankon por ĉio kaj… ĝis revido! – Damien



„Dankon pro ĉio, kion ni faris. Ĉiu momento kiun ni pasigis kune, estis magio. La kompakt-disko estas unu tre bela surprizo. La kantoj alportas al mi multajn memorojn. Per la KD ili estas tute gravuritaj en mia koro por ĉiam. – Alessio

„Mi havis grandan plezuron lerni kun ili. La Malferma Tago certe estis granda laboro, sed ĝi valoris. Mi tute ne sciis kial ili registris nin, kaj nun mi

scias: ili volis eldoni KD kun niaj kantoj. Dankon por la KD! Mi tre ŝatis ĉiujn kantojn. – Numa, aŭtoro de la kanto „Sonĝo-monde”.


„Mi volas vere danki ilin por la KD, mi aŭskultas ĉiujn kantojn sur ĝi. Mi trovas la kantojn tiom belaj kaj ili kantas tiom belege! Dankon ankaŭ por tio, ke niaj kantoj estas sur la KD! Mi esperas revidi ilin ankoraŭ unu fojon dum mi estas ankoraŭ lernanto en La Granda Ursino. – Clovis, aŭtoro de la kanto „Frateco”.

Mi esperas, ke ni donis emon al vi akiri la novan KD-n de Kajto. Se vi ankoraŭ ne posedas ĝin, ne hezitu, valoras havi kaj aŭskulti ĝin! Konklude: nia unika projekto alportis ne nur kvar belajn novajn kantojn al Esperantujo, sed ankaŭ ĝojplenajn labor-horojn, -tagojn al la gelernantoj, belajn personajn travivaĵojn kun simpatiaj kaj sindonaj Esperanto-kantistoj, kaj multajn tre pozitivajn sentojn, emociojn, kiuj espereble longe akompanos ilin. Jen la nuna stato de nia bela projekto kun la jam ekzistantaj, konkretigitaj rezultoj kaj eble mi povas flustre diri, ke tio ankoraŭ ne estas la fino, kelkaj pliaj etapoj lige al ĝi estas ĝuste nun realigataj…

Ps: Kvankam la kutima sinteno estas la ignoro de mia helpo-peto, eĉ se mi tre malofte faras tion, tamen mi lasas ĝin ĉi tie: la ekonomia kaj la postkovida krizoj bedaŭrinde ne favoris al tiu ĉi bela, eta lernejo. Se vi taksas nian laboron valora, daŭrigenda kaj se vi ŝatus helpi la lernejon (kiu havas neniun ŝtatan aŭ eksteran financan helpon!) por la pluvivigo, viaj kontribuoj (de ajna sumo) estas tre bonvenaj sur la konto de la lernejo kun mencio de „Esperanto”: *Association de l'Ecole de La Grande Ourse, Rue des Recrêtes 18, CH-2300 La Chaux-de-Fonds IBAN: CH40 0076 6000 1028 9657 3*

LINGVOLERNADO PER DANC-TAPIŜOJ

La populara danc-tapiŝo estas uzebla ne nur por agrable amuzi sin per dancado, sed ankaŭ por ekzercado pri fremdaj lingvoj! – Tion pruvas la nova instruila projekto, evoluigita enkadre de la Erasmus-projekto „Vortoj”.
Danc-tapiŝojn oni kutime uzas por saltadi per difinitaj paŝoj al diversaj direktoj laŭ la ritmo de la muzika videaĵo, vidata sur granda ekrano. La tapiŝo kaj la ekrano estas konektitaj al komputilo. Nun anstataŭ la muzikaj klipoj oni vidas lingvajn ekzercojn, sed por solvi ilin oni devas fari same per saltado (paŝado) al konkretaj kvadratoj (direkto-sagoj) de la tapiŝo - granda defio, kaj interesa ludo!



Kombinado kun fizika korpo-moviĝo (paŝado, saltado aŭ dancado) igas la lingvolernadon interesa (kaj samtempe tre utila) ludo, kiu efikas pozitive ankaŭ al la sano!

La celgrupo de la nova instruilo estas bazlernejanoj super 10-12-jara aĝo, sed kiel la ĝisnuna testado kaj provludoj montris, ankaŭ plenkreskuloj tre bone amuziĝas kaj kun utilo uzas la novan ludilon… :-)))



Principe la programo estas planita por individua ekzercado, sed oni povas konekti al la komputilo eĉ 2 danctapiŝojn, do oni povas ankaŭ ludi konkurson, kiu estis tre atentoveka en la eksperimentaj klasoj. Kroma valoro de la programo estas tio, ke ĉiu spektanto (ceteraj, momente neludantaj lernantoj en la kurso aŭ lerneja klaso) vidas la demandojn kaj ankaŭ ili mem serĉas la solvon, do eble ludas nur 2 lernantoj, tamen ekzercas sin ĉiu ĉeestanto!

Uzebla en kaj por 10 lingvoj – kaj senpage!

La uzebla surfaco de la projekto estas multlingva, ĝi ekzistas en 10 lingvoj. En la programo mem oni povas trovi ekzercojn en 10 diversaj lingvoj, kaj ĉiu el ili estas atingebla en ĉiu uzebla lingvo! La gamo de uzebloj vere estas internacie vasta!



Post la fino de la projekto, ekde la nova jaro 2024 la programo estos libere kaj SENPAGE atingebla por ĉiuj interesiĝantoj en la retejo: http://vortoj.net – oni povas uzi la ekzercilon rekte en la retejo, **nur per sia komputila retumilo, kaj oni ne devas elŝuti aŭ instali ion ajn!**

Post la startigo de la programo kaj elekto de la uzata surfaca lingvo, oni devas registriĝi, ĉar la programo mezuras la atingitajn poentojn, tempon de respondado, montras la erarajn respondojn, kaj tiel ebligas ankaŭ la konkursadon inter la uzuloj, lernantoj.


Post la eniro, oni devas elekti la lernatan lingvon, kaj elekti inter la jam preparitaj ekzerco-TEMOJ.

La ekzercoj mem povas esti diversaj, ekzistas 5 ludo-modoj:



- falantaj vortoj (oni devas trovi la ĝustan respondon antaŭ ol la falanta vorto atingas la subon de la ekrano)

- ortografio (oni devas trovi la ĝustan respondon pri gramatikaj demandoj)
- bildo-vortoj (aperas bildo, kaj oni devas elekti la ĝustan vorton, kion ĝi signifas?)
- aŭdo-vortoj (oni povas aŭdi vortojn, kaj devas kompreni ilian ĝustan signifon)
- konkurso (la saman demandon devas respondi ambaŭ ludantoj, kaj ili vidas sian pozicion, kvazaŭ ili partoprenus iun kur-konkurson).



La lernilo estas projektita principe por uzado kun danc-tapiŝoj, sed eblas uzi ĝin (doni la respondojn) ankaŭ per komputila klavaro kaj ankaŭ per ludtabulo.



La projekton „Vortoj” partoprenas 5 organizoj el diversaj landoj. Gvidas ĝin Edukado@Interreto, E@I el Slovakio, kaj partoprenas ĝin Lingvo-Studio el Hungario, UEA el Nederlando kaj du bazlernejoj en Francio kaj Slovakio.

Kiel Erasmus-projekto, la oficiala lingvo de la kunlaboro bedaŭrinde estas la angla, sed en la praktiko paralele funkciis ankaŭ Esperanto… :-)
La esenca parto de la servila programo jam estas preskaŭ preta, ni sukcese testis ĝin, kaj nun okazas la plenigo de la bazaj datumbazoj de ekzercoj en la koncernaj 10 lingvoj.
En la sekva fazo oni planas ebligi al instruistoj mem krei sian datumbazon kun diversaj ekzercoj, kaj uzi ĝin kun siaj lernantoj. Sed tio eble estos realigita en la nun planata dua fazo, en nova projekto.



SZILVÁSI László

Esperanto en la arta mondo

Intervjuo kun Maximiliano GARCIA

Maximiliano Garcia kaj Wei Ningna malfermis per sia mallonga poezia filmo en Esperanto pri la reunuigo de la du Koreioj la ĵus finiĝintan Internacian Artfestivalon en Sud-Koreio. En tiu ĉi intervjuo Max parolas al ni pri ilia sperto kaj eblaj estontaj kunlaboroj inter Esperanto kaj la Arta mondo.

MG: Max Garcia
AM: Alessandra Madella

AM: Kiel oni invitis vin fari mallongan filmon pri la reunuigo de la du Koreioj por internacia evento?
MG: Komence de la jaro la ĵuriestrino Gloria Grau Ruiz, artistino de Barcelono kaj granda amikino de Esperanto, komunikis al ni, ke la foto „Trans la imago" de Ningna kaj mia foto „Kaptita (en la reto)" estis invititaj partopreni en la 9-a Internacia Artfestivalo Geoje kun la temo „Vivo estas Arto – Rekunligu". La evento okazis samtempe en diversaj sud-koreaj urboj, kiel Gwangju, Jeongup, Geoje kaj Yeosu. Ni havis, do, la ŝancon persone partopreni en tiu grandioza festivalo, en kiu 347 artistoj el 56 landoj prezentis siajn pentraĵojn, fotojn, filmojn/videojn kaj skulptaĵojn. La artistoj donacis

siajn kreaĵojn por aŭkcioj al lokaj muzeoj kaj galerioj, kiel la Art-Muzeo Yukyung de Geoje.
Krome, tuj post tiu sciigo, ni havis la grandan honoron esti elektitaj por realigi videon por la 70-a jarreveno de la armistico inter la du Koreioj, por montri kiel arto povas kontribui al la edukado al paco. Tiel ni kreis la mallongan filmon „Mesaĝo al ĉiuj koreoj”, kiu nun spektebias ankaŭ en la jutuba kanalo de ILEI (https://m.youtube.com/watch?v=naJkJMeuMIM).



Surfote: Maximiliano Garcia, Drako, Ombro kaj koreaj geamikoj

AM: Kial vi decidis realigi tiun ĉi videon rekte en Esperanto?
MG: Esperanto estas internacia lingvo por la homaro, kies baza espero estas realigi pacon inter la popoloj de la mondo. Mi firme opinias, ke edukado estas la ŝlosilo por akiri tion, ĉar ĝi pripensigas homojn trans ĉiuj akiritaj stereotipoj. Nia mallonga video klopodas prezenti la kompleksan historian konflikton inter Nord- kaj Sud-Koreio en simpla poezia maniero kaj ni uzis la internacian lingvon por akiri neŭtralan vidpunkton.

AM: Kiel reagis al ĝi la publiko kaj la lokaj aŭtoritatoj?
MG: Por nia laboro ni ricevis oficialan dank-atestilon de membro de la Nacia Asembleo. Tiu rekono estis kortuŝa afero ne nur por ni, sed ankaŭ por la geamikoj kaj la Esperantaj asocioj kiel ILEI, kiuj morale subtenas nian laboron. Nin manpremis membroj de la Nacia Asembleo, la estroj de la Urbaj Konsilantaroj de Geoje kaj Jeongup, de la Nacia Fonduso por Kultura Heredaĵo kaj de pluraj muzeoj kaj muzeaj asocioj. Nia mallonga filmo ebligis al ni konatiĝi kun profesoro pri Politikaj Sciencoj de la Esplorinstituto de Unuiĝintaj Nacioj ĉe la Nacia Universitato Pukyong de Busano, sed ankaŭ kun reĝisoroj de historiaj dokumentaj filmoj kaj teatraĵoj. Ni aparte ĝojas, ke ni povis havi tiom multe da interesaj kontaktoj dank' al Esperanto.

AM: Kiel vi vidas la rilaton inter Esperanto kaj la Arta mondo?
MG: Ni opinias, ke Arto kaj Esperanto povas bonege kunlabori por disvastigi la mesaĝon de paco. Tre gravas montri al la mondo, ke Esperanto estas multe pli ol lingvo. Estas multe da talentaj homoj en Esperantujo, kiuj bezonas nur iom da kuraĝigo por iĝi kreemaj. De tiu vidpunkto, ni povas lerni multe de la Arta mondo kaj de ĝia same internacia komunumo. Dum la naŭ tagoj kaj ok noktoj de la festivalo ni paroladis pri Esperanto kun la aliaj partoprenantoj, kiuj tre interesiĝis kaj demandis, kie oni povas lerni ĝin. Multaj el ili neniam aŭdis pri ĝi antaŭe. Tio pruvas, ke ni povas fari multege. Sed kiel papilioj ni devas unue eliri el niaj kokonoj kaj malfaldi niajn flugilojn por disvastigi la mesaĝon en malsamaj medioj, interalie per artaj formoj kaj vojoj.

AM: Kiel koreaj esperantistoj akceptis vin?
MG: Interalie multe helpis nin per sia traduko de nia filmo Chang Sumí (Atena) de Seulo. Kaj ni aparte volas danki al Ombro (Jang Jeongyeol), Drako (Kim Hakyong) kaj Masoris (Kim Karam) de Busano, kiuj eĉ antaŭ nia alveno en la urbon jam informis la lokan Esperantan movadon pere de sia loka ĉiusemajna bulteno. Krome, Ombro organizis por ni renkontiĝon kun ĵurnalisto de la ĉefa gazeto de Busano, kiu verkis tie pri nia vizito. Dank' al la lokaj samideanoj, ni povis viziti la domojn de multaj amikoj, kiuj regalis nin per bongustega teo. Ni eĉ povis gustumi la delican likvoron faritan el Puera teo de belega loka artistino kaj kantistino, kiu multe interesiĝis pri niaj projektoj.

AM: Pri kiuj aliaj projektoj koncerne Esperanton vi estas laborantaj nun?
MG: Ni estas, fakte, laborantaj pri multe da aliaj projektoj. Aparte grava por ni estas eduka serio de videoj en Esperanto pri la mondo de ĉina teo,


kunlabore kun ILEI kaj MA-GA-Filmoj. Ni estas nun en la koncepta fazo kaj ni planas serioze eklabori por ĝia realigado en la venontaj monatoj. Do, ni esperas, ke la legantoj de IPR baldaŭ povos aŭdi multe pli pri tio kaj subteni nin en nia daŭra agado.

Chrdle, Petr: Mia vivo kun Esperanto

Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023, 251 paĝoj

(Jen du ĉapitroj el la libro)

Instruado



Kvankam mi konsideras instruadon de Esperanto kerna kaj tre valora agado de spertaj esperantistoj, mi longe eĉ ne pensis, ke mi iam gvidu kurson. La kialo klaras. Mi havis tiom da aktivaĵoj kaj devoj kaj en mia profesia vivo, kaj ene de la Esperanto-movado, ke mi ne povis promesi esti ĉiusemajne je la sama horo ie por instrui la lingvon. Tamen la sorto volis, ke mi kelkfoje gustumu ankaŭ ĉi tiun rolon.

Instruado al japanoj

Dum iu mia restado en Japanio min alparolis sinjorino Ooba Shigeko, ĉu mi pretus gvidi konversacian kurson por la klubanoj de la Tokia klubo, kiun ŝi estras kaj kie ŝia edzo, profesoro Ooba Atsuo gvidas kurson de Esperanto. Mi konsentis, sed pro miaj tempaj ebloj temis nur pri tritaga intensiva kurso por jamaj progresintoj. Tio estis mia unua sperto kun la instruado de lingvo, sed mi trovis tion ankaŭ amuza. Ekzemple, kiam ni ne povis interkompreniĝi pro aliaj realaĵoj en la medio, en kiu ni vivas. Mi montru unu ekzemplon.

Mi skribis unu tagon sur la tabulon en unu kolumnon manĝaĵojn kaj en la apudan trinkaĵojn. Ĉiu, kiu iam instruis, scias, ke kvankam la instruisto estas

turniĝanta al la tabulo, do dorse al la lernantoj, li sentas, ke en la klaso io ne estas en ordo. Mi do turniĝis kaj demandis, kio okazis. La respondo estis, ke mi faris eraron. Do mi ĉion atente relegis, sed vidis neniun eraron; tial mi demandis kiun.

Vi skribis supon inter la manĝaĵoj.
Nu, kio, ĝi ja estas manĝaĵo!

Post tio eksplodis rideto kaj la lernantoj rigardis min kvazaŭ strangulon. Mi tamen ne volis kapitulaci kaj diris al ili, ke survoje al la leciono mi manĝis en la bufedo apud la lernejo bongustan legoman supon. Kaj denove rido.

Tio ja estis legomo en supo! Vi ja devis unue manĝi la legomon kaj sekve trinki la supon!

Tiun klarigon mi devis akcepti. Efektive, mi unue manĝis per bastonetoj la kuiritan legomon kaj poste trinkis de la bovlo la restantan supon. Kaj per tio mi rimarkis, ke ne nur mi instruas al la lernantoj Esperanton, sed ankaŭ reciproke ili min pri la japana kulturo, nunmomente pri gastronomio.

Post tiu ekzemplo, kiel la instruado estis lerniga ankaŭ por mi, mi aldonu, ke la rezulto estis tiel sukcesa, ke mi estis petata prepari por la studentoj daŭrigan kurson en Ĉeĥio, sed se ili jam veturos tiel longe, ankaŭ por la posttagmezoj interesan turisman programon.

Nu, certe estus logike, se la kurson gvidus Stanjo, kiu estis profesie edukistino kaj krome havis kiel Esperanto-instruisto spertojn. Sed ŝi estis ankaŭ licenciita ĉiĉeronino, do ni interkonsentis, ke instrui antaŭtagmeze kaj tuj poste gvidi la grupon kaj ĉiĉeroni estus por unu persono tro. Krome mi jam instruis ilin en Japanio, do mi daŭrigu ankaŭ en Prago kaj post tagmanĝo ŝi prizorgos por ili turisman programon. Ĉio iris glate kaj tio do estis mia dua instruista sperto.

Instruado de triaaĝuloj

Pri la unuaj jaroj de mia instruado de la uloj de la tria aĝo (maljunuloj) rakontas la kontribuaĵo al la prelegkolekto de KAEST envicigita en la parton B de ĉi tiu libro. Mi volas emfazi, ke mi komencis la kurson post hazarda aŭskultado de la radia programo pri la Alzheimer-malsano. En ĝi mia amiko kaj fama ĉeĥa psiĥiatro kaj esperantisto Max Kašparů rekomendis la lernadon de Esperanto kiel la plej efikan preventon kontraŭ tiu malsano. Ĝin li komparis kun lingva mozaiko, kiun oni logike kunmetas, do per kiu oni

ekzercas kaj memoron kaj logikon, kaj kiel apudan efikon la studento gajnas novan komunikilon kaj novajn amikojn, kio ankaŭ por maljunuloj gravas.

Mi do proponis ĝin ne por produkti perspektivajn esperantistojn, sed por helpi al miaj studentoj preventi „stultiĝon". Krome mi ekkomprenis, ke tio povas pere de miaj studentoj levi la konscion pri Esperanto, ĉar ili certe parolos pri sia lernado kaj ene de siaj familioj kaj al siaj amikoj. …

Informado pri Esperanto

Jen kelkaj specimenoj, kiel mi almenaŭ iom kontribuis al informado pri Esperanto. Mi plurfoje prelegis pri efika informado, aŭ se vi volas varbado, kaj ĉiam mi mencias, ke multe pli efika estas infektado per Esperanto ol rekta varbado. Infektadon mi nomas, se la temo pri tiu prelego, artikolo, aŭ simpla parolado ne estas Esperanto, sed alia interesa temo, laŭeble pri kiu oni ion scias, kaj Esperanto estas nur menciita en tre pozitiva lumo. Ekzemple kiel ĝi helpis, kial ktp.

Mi spertis, ke kaze de mia prelego pri io ajn, dum kiu mi mencias pozitive Esperanton, preskaŭ certe venas en la diskuto demandoj ne nur pri la objekto de la prelego, sed ankaŭ pri Esperanto, foje pri ĝi eĉ pli. Estas konata fenomeno, ke kiu demandas, tiu perceptas la informojn multe pli atente, ol se ni informos onin niainiciate sen onia antaŭa montro de intereso.

Kaj ni ne devas esti seniluziigitaj, se neniu sekve eklernos la lingvon. Ja ankaŭ mi havas tre pozitivan rilaton al multaj agadoj, sed ne montras tion kaj ne aliĝas, ĉar simple mankas tempo por tio. Do eĉ se oni semas pozitivajn informojn pri Esperanto, jam tion oni povas konsideri sukceso, ĉar ja la plej danĝeraj por ĝi estas grandaj antaŭjuĝoj.

Sed mi montru almenaŭ iujn konkretajn ekzemplojn. Mi sekve citas la lastajn du subĉapitrojn. La antaŭaj estas: Prezentoj de fremdaj landoj, Mistrafita eblo en elementa lernejo, Oficialigo de Esperanto dum faka internacia konferenco, Kongreso de fervojistoj-radioamatoroj, Oficialigo de Esperanto en nupta ceremonio kaj Esperanto kaj la ĉeĥa financofico.

Ekscio pri rezulto post multaj jaroj

En la jaro 2022 la praga Esperanto-klubo festis 120 jarojn de sia ekzisto. Kiel membro de la klubo mi partoprenis kaj kontribuis per prelego pri la vivo kaj verko de Eli Urbanová, nia fama kunklubanino, ĉar ŝi havis eĉ du gravajn jubileojn: 100 jarojn post la naskiĝo, 10 jarojn post la forpaso. La duan tagon,

kiam mi ĉetabliĝis, restis apud mi libera loko kaj venis al mi nekonata juna viro kaj demandis, ĉu li povas apudiĝi. Li prezentis sin al mi kiel Adam Káva kaj mi al li, sed li interrompis min dirante, ke li min konas kaj li venis precipe, por ke li povu renkontiĝi kun mi.

Sekve li rakontis en flua Esperanto, ke li ĉeestis mian prelegon pri Esperanto antaŭ 15 jaroj en gimnazio dum la Eŭropa tago de la lingvoj. Kaj ke ni post la prelego parolis kaj ke mi eĉ donacis al li mian lernolibron *Esperantem za tři měsíce* (per Esperanto post tri monatoj). Kaj ke li laŭ ĝi vere lernis Esperanton, sed hodiaŭ li la unuan fojon parolas en ĝi kun alia viva esperantisto, antaŭe li uzis ĝin nur pasive en la reto. Kia bela surprizo de mi, trovante post 15 jaroj rezulton de mia iama prelego!

Tio rememorigis min pri alia pli frua ekscio pri la frukto de la sama lernolibro. Ni longe estas amikoj kun Petro Baláž, nun prave konsiderata unu el la plej famaj esperantistoj en la mondo. Sed neniam ni babilis pri niaj esperantistiĝoj. Do kia estis mia surprizo, kiam mi aŭdis lin dum lia prelego en la Esperanto-muzeo en Svitavy diri, ke li ellernis Esperanton vere dum tri monatoj lasante sin gvidi per la lernolibro de la ĉeestanta Petro Chrdle, *Esperantem za tři měsíce*.

Nu, ĉu io povus pli plezurigi la aŭtoron de la lernolibro, ol se laŭ ĝi konatiĝis kun Esperanto tiu Esperanto-famulo?! Mi nur bedaŭras, ke tion ne ĝisvivis mia edzino kaj kunaŭtorino Stanjo. Cetere, li ankaŭ eldonis la slovakan version de la pli ampleksa versio de ĝi *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z) en traduko de Katarína Nosková en sia eldonejo Espero.

Ŝanĝo de la temo de artikolo

La lastajn du ekzemplojn mi montros de la plej proksima pasinteco, la jaro 2022, kvankam similaj okazis ankaŭ pli frue.

Dum unu pilgrimvojo, en kiu mi hazarde partoprenis, ĉar ĝi gvidis tra mia loĝloko, mi parolis kun ĝis tiam al mi nekonata viro. Kiel mi dum la parolo eksciis, li estis redaktoro de la gazeto *Tvůrčí život* (Krea vivo). Fine li demandis min, ĉu li povus fari kun mi intervjuon pri ekoturismo kaj mia nova libro pri orientaziaj landoj. Mi konsentis kaj baldaŭ venis retmesaĝo kun la demandoj.

La unua demando estis *En kunteksto kun vi eniras mian kapon tri vortoj: vojaĝado, pilgrimado kaj ekoturismo. Ĉu vi perceptas tiujn tri agadojn aparte aŭ kiel unu tuton?* Al kio mi tuj komence reagis *Mi iom ĝustigos tion.*

Se vi serĉas aktivadojn, kiuj karakterizas min, mi anstataŭigu pilgrimadon per Esperanto, kaj eĉ ŝanĝus la vicigon al Esperanto, vojaĝado kaj ekoturismo… La rezulto estis, ke li la anstataŭigon enmetis ankaŭ en la titolon, kiu do sonas

Intervjuo kun Petr Chrdle pri ekoturismo, orienta Azio kaj Esperanto.

Kaj li eĉ ŝanĝis la demandojn kaj la lastaj kvar temis pri Esperanto, kiuj, kun miaj respondoj, plenigis du paĝojn en dekpaĝa artikolo.

Io simila okazis, kiam mi havis je dispono du paĝojn en la gazeto *Knihkupec* (Librovendisto) por prezenti mian eldonejon KAVA-PECH okaze de ĝia tridekjariĝo. Mi kompreneble multe menciis Esperanton kaj ankaŭ, ke danke al la eldonataj libroj en Esperanto mia malgranda eldonejo estas enskribita en la libro de ĉeĥaj rekordoj kiel la eldonejo eksportanta siajn librojn en la plej multajn landojn de la mondo. Tio eĉ igis la redaktoron ŝanĝi la titolon al *S esperantem do světa* (kun Esperanto en la mondon) kaj subtitolo *Tak vznikl i český knižní rekord* (Tiel ekestis eĉ la ĉeĥa libra rekordo).

Kaj el kvar ilustraĵoj tri tuŝas Esperanton: Mi sur la pinto de la monto Fuĵi post la UK en Jokohamo kaj du kovriloj, nome la lernolibro *Esperanto od A do Z* kaj traduko el Esperanto *Láska, kašel a smrt. Lidé a covid*. (Amo, tuso kaj forpaso. Homoj kaj kovimo.)

La Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato dekjariĝas

de Alessandra MADELLA

La Zaozhuang-Universitato en la provinco Shandong de Ĉinio estas nun festanta la dekjariĝon de sia Esperanto-Muzeo, kiu unue malfermis siajn pordojn dum la Tutlanda Kongreso de Novembro 2013 kaj kiu donis gravan impulson al la kreado de la kvar-jara Esperanto-fako en la sama universitato. De la komenco de Oktobro 2023, celebras la gravan datrevenon du monatoj plenplenaj je eventoj, konferencoj kaj eldonaj agadoj, inkluzive de poŝvortareto por la studentoj de la Esperanto-fako kaj kompleta papera katalogo de la plej signifoplenaj konservaĵoj. La trian de Oktobro inaŭguris la ĉiusemajnan serion de retaj prelegoj Sun Mingxiao (Semio), kiu estis la ĉefa motoro de la Muzea stariĝo kaj restas la plej aktiva prizorganto de ĝia

disvolvo. Li vigle kaj entuziasme parolis pri la historio de la Muzeo, ekde siaj sukcesaj klopodoj persvadi la estrojn de la Universitato subteni la ideon ĝis la interesaj perspektivoj por la estonteco, kiam tri iamaj studentoj de la Esperanto-fako revenos al Zaozhuang por labori tie post sia magistriĝo en Poznano.



Antaŭ la Esperanto-Muzeo kun la libro „Rakontoj pri la Silka Vojo”

Sekvis kleraj lekcioj de akademiano Bak Giwan pri la unua Esperanto-gazeto, de la verkisto Hu Guopeng (Ardo) pri la historio de la Esperanto-literaturo kaj de multaj aliaj fakuloj. Mi mem rete prezentis mian libron *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, en kiu mi iom parolas pri la sperto de la Zaozhuang-Universitato. Sed eblis ankaŭ aŭdi la voĉon de malnovaj studentoj, kiuj helpis en la starigo de la Muzeo mem kaj ankoraŭ fieras pri tiu kontribuo, kiu komprenigis al ili la signifon de „movado” kaj ŝanĝis ilian vivon. La nunaj gestudentoj en Poznano aparte rakontas pri sia vivo ĉe pola universitato, kie ili bone fartas kaj multe lernas. Ĉiam sekvas la prelegojn en la reta platformo de Tencent multnombra kaj atenta publiko de precipe ĉinaj samideanoj, kiuj faras trafajn demandojn kaj

intense diskutadas la enhavon, kreante etoson de forta engaĝiĝo kaj gravan okazon de plia lernado. Ankaŭ la studentoj de la Esperanto-fako, kompreneble, multe profitas de tiu ŝanco kaj regule partoprenas en tiu serio de eventoj, kiu kulminos en Decembro per la persona alveno al Zaozhuang de elstaraj ĉinaj kaj eksterlandaj esperantistoj, inkluzive verŝajne la prezidanton de UEA Duncan Charters.

Krom tiuj retaj prelegoj por specife samideana publiko, la dekjariĝo de la Muzeo estas ankaŭ bona okazo por organizi serion da ĉeestaj prelegoj kun pli klara varbada celo. Ekzemple, mia prelego „Miaj mallongaj filmoj en Esperanto” de la dekoka de Oktobro intencis enkonduki al 150 gestudentoj de la Fremdlingva Departemento la internacian lingvon en malstreĉa kaj amuza maniero. Fakte, en Julio 2023 la departemento translokiĝis al la nova kampuso de la Zaozhuang-Universitato, kiu troviĝas en tute malsama parto de la urbo sen rekta aŭtobusa kunligo, dum la Esperanto-Muzeo restos en la malnova kampuso eble ankoraŭ dum du jaroj. Pro tio la plejparto de la gestudentoj de la unua jaro ne havis la ŝancon viziti la Muzeon, kiu estis senpage kaj facile alirebla al aliaj antaŭuloj. Do, nepras revivigi inter ili la konscion pri tio kio Esperanto estas, montrante ĝiajn valorojn kaj ĉefe kion junuloj povas praktike fari per ĝi.

Antaŭ la prelego mi instruis al la jam ĉeestantaj gestudentoj kelkajn salutojn en Esperanto, kiujn ni daŭre ripetadis, kiam novuloj eniris la salonon. Tio kreis en la gejunuloj grandan scivolemon. Post mallonga enkonduko, mi montris tri mallongajn filmojn. La unua estis mia animacio „La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo”, pri kiu mi klarigis kiel mi realigis ĝin per senpage elŝutebla desegn-programo kaj per la voĉoj de la membroj de la Esperanto-Grupo „Giorgio Canuto” de Parmo, mia urbo en Italio. Pri la afero multe demandis junuloj, kiuj mem desegnas animaciojn kiel hobion. La dua filmeto estis „La lumo de la Estonto”, kiun mi realigis kun italaj kaj afrikaj amikoj en Parmo dum la Someraj ferioj kaj per kiu mi partoprenis en la Bona Filmfestivalo de Esperanto-USA. Ankaŭ en tiu ĉi kazo mi klopodis kuraĝigi la studentojn mem realigi filmetojn kaj partopreni en la venonta eldono de la festivalo post ses monatoj, eĉ se ili ne konas Esperanton. Fakte, la celo de la usonaj organizantoj estas ekzakte engaĝi ankaŭ ne-esperantistojn en facila kreado pere de Esperanto, kiu estas tuj praktike uzebla lingvo. Mia tria ekzemplo estis la lasta parto de la „Homa Ĉeno” de ILEI, kiu naskiĝis danke al ideo de Max Garcia kaj kiu nun kunligas jam pli ol 500 homojn de ĉiuj kontinentoj por simbole montri kiel Esperanto helpas komunikigi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj.

Gestudentoj trovis la epizodon de la kunkongreso de TEJO kaj ILEI en Linjano tre interesa kaj „kolorplena”. Post mia prezentado, ili scivoleme demandis min kiel diri kelkajn frazojn en Esperanto (de „Mi amas vin” al „Ĉu vi havas koramikinon?”) kaj ni multe amuziĝis ripetante ilin.

Espereble tiaj prezentadoj kontribuos krei favoran etoson por niaj Esperanto-agadoj, atendante la tutan translokiĝon de la Muzeo en la nun konstruiĝantan grandan bibliotekon de la nova kampuso. Certe en sia nova sidejo ĝi povos denove iĝi grava kultura rimedo por la gestudentoj de la lingvaj fakoj, altirante ilian intereson. Krome, ĝi troviĝos tute proksime de la stacidomo de la superrapidaj trajnoj inter Pekino kaj Ŝanghaio, kio faciligos vizitojn de esploristoj kaj de esperantistoj ĝenerale. La pli vasta konstruaĵo ebligos reunuigi ĝiajn tutajn kolektojn en unu lokon, sed ankaŭ multe kreskigi ilin por la profito de la loka kaj monda Esperanto-movado. Ni povas do imagi, ke la venontaj dek jaroj de la Esperanto-Muzeo de la Zaozhuang-Universitato estos viglaj, sukcesaj kaj energie plenplenaj kiel la unuaj dek jaroj de ĝia vivo.

Pri la novaj lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI

de Alessandra MADELLA

Por subteni la partoprenon de niaj reprezentantoj en la ĉi-novembra granda evento de UNESKO en Parizo, ILEI decidis lanĉi novajn lingvajn paĝojn por nia retejo. Niaj antaŭaj spertoj montris al ni, ke tio multe gravas, ĉar la retejo estos la unua loko por pliaj informoj traserĉata de homoj, kiujn niaj reprezentantoj sukcesos interesi pri Esperanto kaj ĝiaj idealoj en la malmulte da tempo disponebla ĉe la sidejo de UNESKO. Kvankam traserĉante la retejon oni jam povis trovi materialojn en multe da aliaj lingvoj, ili restis dise kaŝitaj en malfacile videblaj lokoj kaj ilia ofte ne ĝisdatigita enhavo povis konfuzi la legantojn. Male, nun ĉiuj niaj ĉefaj materialoj en la ses oficialaj lingvoj de UNESKO (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa) facile atingeblas rekte el la ĉefpaĝo www.ilei.info, per alklako de butonoj klare bonvenigantaj onin en la dezirata lingvo mem. Kvankam nia retejo ankoraŭ havas malpli da lingvoj ol tiu de UEA, ĝi plie kovras la ĉinan kaj la araban, ambaŭ tre gravajn lingvojn en nia nuna mondo kaj tre strategiajn por UNESKO kaj la Unuiĝintaj Nacioj.



La koncepto de la lingvaj paĝoj havas du celojn: 1) doni sencon de unueco de la ligo per la klara prezentado de la kernaj punktoj de ĝia identeco kaj 2) montri kiel nia vigla agado koncernas diversajn partojn de la mondo pere de prezentado de niaj projektoj adaptitaj al la lokaj situacioj de ĉiu lingva areo.

Por atingi daŭripovecon kaj ne devi tro ofte retraduki la prezentadon de la ligo al tiom da lingvoj, ni klopodis koncize fokusiĝi pri la plej esencaj punktoj, simple resendante al la koncernaj paĝoj de la retejo pri la plej ofte ŝanĝiĝantaj informoj kiel nombro de membroj, listo de kongresoj, nomoj de sekciestroj ktp. La prezentado de la ligo estas tamen sama en ĉiuj lingvoj por substreki per tre fidelaj tradukoj nian komunan karakteron.

Male, la suba parto pri projektoj ne baziĝas sur fidelaj tradukoj, sed pri rapida kaj trafa apero de la projektoj en la ĉefaj lingvoj de ilia nuntempa aŭ potenciala agado. Tio garantias rapidecon, ĉar oni ne devas nepre denove atendi ĉiujn tradukojn, celkonscion, ĉar la mesaĝo pli facile adapteblas al la celata publiko, kaj la eblon ne nur disvastigi la projektojn trans la lingvojn al novaj geografiaj areoj, sed ankaŭ evoluigi ilin dum la procezo.

Mi viziis la konstruadon de la lingvaj paĝoj kiel la koncerna estrarano, sed mia laboro ne eblus sen la subteno de miaj kunestraranoj Elena Nadikova kaj Fernando Pita, kiuj zorgis pri la rusa kaj hispana tradukoj respektive. Maruf Sultan kaj Wei Ningna donis grandan kontribuon por la disvolvo de la arabaj kaj ĉinaj paĝoj, kun la kontrolado de pluraj ne-esperantistaj geamikoj. Same la korektado de ne-esperantista amikino kunlaboranta kun UNESKO por alproksimiĝi kiel eble plej multe al la pensmaniero de la celata publiko estis fundamenta por la franca versio, verkita de Didier Janot, Max Garcia kaj mi. Plia grava kontrolado de la surretigita teksto kun trafe

plibonigaj proponoj venis de Emmanuelle Richard kaj Mireille Grosjean. En ĉiu lingvo ni klopodis kiel eble plej multe eviti idiotismojn kaj tiel respeguligi la „internacian” version normale uzatan dum la laboroj en internaciaj instancoj. La plej granda pacienca laboro estis tiu de Cristina Bollini, kiu devis daŭre cerbumi por trovi la plej bonan manieron alŝuti la lingvajn enhavojn al nia retejo (precipe malfacilan ekzemple pri la araba) kaj toleri multnombrajn kontrolojn kaj reviziojn por atingi la kiel eble plej grandan perfektecon.

Mi esperas, ke ilia duobla karaktero povos helpi en la venontaj jaroj la daŭripovon kaj la kontinuan kreskon de niaj lingvaj paĝoj, kie ĉiam novaj projektoj povos aperi, tiel montrante la vivantecon de nia asocio en la gravega praktika agadkampo sen malpliigi la gravegan senton de nia unueco.

El la landoj kaj sekcioj

Belgio

Esperanto en Flandrio



Maloftas okazoj por instrui la lingvon E-o en flandraj lernejoj. Tamen dum projekttagoj estas eblo doni enkondukon al volontemaj lernantoj kaj instruistoj. Sur la aldona foto vi povas mem konstati la fervoron de entuziasmuloj el la dua jaro de mezgrada lernejo, akompanataj de lernema instruisto. En la tri paralelaj jaroj de la unua grado en la Antverpena Liceo „Durlet” (nun „Zenito”) la lernantoj ricevis duhoran devigan enkondukon. La entuziasmo tie estis multe pli malalta ol en la lasta jaro de la najbara baza lernejo (nomata „La stelobservanto”). Certe, la hejmeca etoso en la klaso de la lasta jaro de la baza lernejo multe helpis al la spontanea scivolemo de infanoj. La rilatoj kun la unua jaro de la mezgrada lernejo estas jam malpli personaj kaj varmaj,

interalie, ĉar la lernantoj konstante ŝanĝas la klason kaj instruiston. Tamen, lernantoj en la lasta jaro de la baza lernejo kaj la unua jaro de la mezgrada lernejoj ankoraŭ estas malfermaj por pridiskuti la valoron de neŭtraleco de lingvo aŭ la teorian rilaton kun porpaca agado.

La dua kaj tria gradoj de la sama mezgrada lernejo ricevis informojn pri Zamenhof kaj la fundamentaj reguloj de Esperanto en la kadro de kurso pri la angla. En la lasta jaro de la mezgrada lernejo, la lernantoj devis, angle, motivigi sian preferon por unu el la ekzistantaj internaciaj lingvoj. Ĝenerale, ili opinias la mondon konfliktplena kaj ne emas fantazii pri utopiaj mondolingvoj. Sed, triono el ili ankaŭ studis la latinan, kaj klare montriĝis, ke lingvaj studoj helpas stimuli la interesiĝon pri Esperanto, kvankam tio ne validas por ĉiuj latinistoj. Konstateblas, konklude, ke ju pli aĝaj lernantoj fariĝas, des malpli ili malatentas pri la graveco de la angla. Ili simple ne povas negi la gravecon de la angla. Tamen multaj lernantoj agnoskas, ke atentigi pri alternativaj komunikiloj valoras kaj necesas.

André STAES

Burundo

En Burundo en septembro komenciĝis ĉeesta kurso en la ĉefurbo Buĵumburo. La kurso okazas en la lernejo kaj ĝi estas gvidata de Aimé Patrick Manirakiza, la kunordigando de la Afrika Komisiono (AK) kaj la prezidanto de la landa asocio de Esperanto en Burundo. La klubo havas 55 gelernantojn.



Aimé Patrick MANIRAKIZA

Ĉinio

Esperanto-kurso en Maljunulara Universitato

En la 12a de septembro, komenciĝis la unua E-kurso en Maljunulara Universitato en Fengtai-gubernio de Anhui-provinco, Ĉinujo. Pli ol 20 geemeritoj partoprenas en la kurso. La Maljunulara Universitaro okazigis solenan inaŭguron por la kurso. La rektoro kaj la vicrektoro partoprenis en la inaŭguro. Sinjoro Li Guoxuan, vicprezidanto de Anhui-Esperanto-Asocio (AEA), faris gratulan paroladon en la nomo de AEA. Sinjoro Yang Haichun, veterana esperantisto, gvidas la kurson. La kurso daŭras 4 monatojn, unufoje ĉiusemajne.



Liu Baoguo, vicestro de la Ĉina Sekcio de ILEI

Germanio

Novaj kursofertoj en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Post sukcesa somera kursaro de aŭtuno 2023 ni denove organizos diversnivelajn Esperanto-kursojn en Esperanto-Centro Herzberg, de bazaj kursoj por komencantoj ĝis perfektigaj kursoj. Por studemuloj, instruemuloj ni rekomendas niajn klerigajn studsemajnfinojn pri gramatiko, lingvistiko, literaturo, movadhistorio, metodiko ktp.

Jen kursoj el nia programkalendaro en 2023-2024:

17-19.11.2023 – Intensa semajnfina kurso A1-A2, B1-B2
15-17.12.2023 – Klerigseminario kun tradicia Zamenhof-festo
15-19.01.2024 – Tutsemajna intensa kurso por komencintoj, konversaciemuloj (A2-B2), ankaŭ kiel klerigcela feriosemajno (VHS Bildungsurlaub) https://vhs-goettingen.de (serĉilo: Esperanto)
09-11.02.2024 – Semajnfina intensa kurso A1-A2, B1-B2
26-30.04.2024 – 'Ekskurso kun kurso' – intensa kurso kun ekskursoj en la Harz-montaro (ĉiuj niveloj)
06-21.07.2024 – Internacia Esperanto-Somerkursaro (Somera Esperanto-Perfektigo – SEP, ĉiuj niveloj). Por studemuloj lecionoj pri Esperanto-literaturo, movadhistorio, kulturaj konoj.
Por instruemuloj aparta trejnado, metodika helpo, ekzercado, provinstruado.
La kurskotizoj estas malaltaj, en la Esperanto-Centro Herzberg ni povas – laŭ interkonsento – oferti malmultekostan tranoktadon, favorprezajn manĝaĵojn, komunan kuiradon, variajn programojn.
Loko: Esperanto-Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Tel.: +49-5521 5983 www.esperanto-urbo.de (Kontaktoj).
Por detaloj, aliĝo, bv. skribi al Peter Zilvar aŭ Zsófia Kóródy: esperanto-zentrum@web.de. Bonvenon!

Hungario

Kvindek jaroj por Esperanto - D-ro Balázs Wacha faris multon por la artefarita lingvo[1]

D-ro Balázs Wacha (Blazio Vaha) festis duoblan datrevenon. Inter la iamaj kolegoj kaj studentoj: unuflanke sian 75-an naskiĝtagon, kaj aliflanke, ke li komencis instrui Esperanton antaŭ 50 jaroj en la Pedagogia Altlernejo en Szombathely.

En septembro de 1973, antaŭ 50 jaroj, Balázs Wacha komencis instrui en la Pedagogia Altlernejo en Szombathely. Li diplomiĝis ĉe la Filologia

[1] Artikolo aperinta ĉe https://www.vaol.hu/helyi-kultura/2023/10/eszperantot-otven-eve-dr-wacha-balazs-rengeteget-tett-a-mesterseges-nyelvert (Ĝi aperis ankaŭ en la presita taggazeto „Vas Népe" la 11-an de oktobro 2023 en la departemento Vas.). Noto de la Redaktoro: ankaŭ Stefan MacGill, alia gravulo de nia movado, nun festis sian 75-an naskiĝtagon. Gratulojn kaj sanon ankaŭ al li!

Fakultato de ELTE kiel instruisto specialiĝanta pri hungara-rusa-Esperanto, kaj kiel ĵusa diplomiĝinto akiris instruistan postenon en la sidejo de la Departemento Vas, kie li komencis kun granda entuziasmo propagandi kaj instrui la lingvon Esperanto inter la studentoj de la altlernejo krom la klasoj okazigitaj por rusaj majoroj. Kun nekredebla engaĝiĝo, li kreis edukajn materialojn, organizis kulturajn programojn en Esperanto, studvojaĝojn eksterlanden, tendarojn, redaktis eldonaĵojn, gvidis sciencajn studentajn agadojn, preparis lingvajn ekzamenojn je diversaj niveloj, instruis en kaj ekster Hungario.



Lia moderna aliro al lingvoinstruado, lia homamo, lia altruismo kaj lia enorma scio pri lingvistiko impresis la studentojn. Ekde 1981 li eklaboris en Budapeŝto, sed la semoj, kiujn li dissemis, jam burĝonis en multaj lokoj de la lando. Estis komencitaj kursoj por infanoj kaj plenkreskuloj, en kiuj Esperanto estis instruata kiel nedeviga aŭ deviga lingvo de instruistoj diplomiĝintaj en la pedagogia altlernejo en Szombathely. Zamenhof, la kreinto de tiu ĉi facile lernebla, politike kaj ekonomie neŭtrala internacia lingvo, iniciatis ĝin por antaŭenigi komprenon kaj pacon inter popoloj kun malsamaj gepatraj lingvoj.

Dum jarcentoj la latina ludis la rolon de la mondlingvo, kaj en la nuna tutgloba mondo la angla fariĝis kutima, sed Esperanto-kluboj ankoraŭ

ekzistas en multaj lokoj de nia lando, tendaroj kaj konferencoj estas organizataj jaron post jaro, kaj aperas eldonaĵoj kreitaj en la artefarita lingvo en diversaj ĝenroj. En la ceremonio okazinta la 7-an de Oktobro en Kőszeg, liaj iamaj studentoj kaj kolegoj salutis d-ron Balázs Wacha, la 75-jaran scienciston, kandidaton de lingvistiko, altrangan sciencan kunlaboranton de la Lingvoscienca Instituto de Hungara Akademio de Sciencoj, aŭtoron de pli ol sesdek studoj publikigitaj en enlandaj kaj eksterlandaj eldonaĵoj. La malnovaj dokumentoj rememorigas al ni multajn eventojn de la esperantista vivo, kiujn li florigis. *(foto de Katalin Kováts)*

Piroska SZOPORYNÉ SZABÓ, Péter MURÁNYI

Japanio



De la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2023, en Esperanto-Domo de Jacugatake (EDJ), staĝejo de Japana Esperanto-Instituto situanta en la montara regiono 200 kilometrojn for de Tokio, okazis ILEI-seminario. Kaptante la okazon de la vizito de Mirejo Grosjean kaj de du aliaj svisaj esperantistinoj al Japanio, nia sekcio planis por la unua fojo en la lastaj kelkaj jaroj seminarion, kiu celis doni al lernemuloj maloftan okazon pasigi tagojn nur en Esperanto. Ĉefe pro tre malforta eno, lastatempe multaj japanaj esperantistoj havas malfacilaĵon vojaĝi eksterlanden. Kaj krome, pro la pandemio de KOVIM-19, malmultiĝis fizikaj renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj.

Partoprenis en la aranĝo 12 homoj, sed ne ĉiuj estis ILEI-membroj. La plej juna estis 20-jara studento, tre kapabla kun scio de pluraj lingvoj, kio donis al la seminario neatenditan efekton. Kvankam li aliĝis meze de la seminario, ni ĉiuj amuze studis, kuiris, manĝis, lavis telerojn kaj babilis kune ĝis malfrua nokto. En la japana lingvo ni nomas tian aranĝon „gasshuku=kunloĝado”.

Ĉiuj partoprenantoj prezentis en asignita duonhoro parolojn kaj opiniojn pri diversaj temoj. Paroltemoj variis, ekzemple fingra kalendaro, kiel

diskonigi Esperanton?, Esperanto-muzeo en Jokohamo, lernfaciliga efiko de Esperanto, Ĝisei-poeziaĵoj k.t.p. Mirejo prelegis kun la titolo „Svislando: mozaiko de kulturoj”.

Alia svisino parolis pri ofte miskomprenitaj, precipe de japanoj, svisrilataj informoj. Estis prezentita, kvankam nur parte, ankaŭ te-ceremonio kaj iu prezentis per bela tenoro kantojn itale kaj Esperante. Dume kaj post tiuj prezentaĵoj ni multe diskutis kaj lernis.

Ni jam alkutimiĝis al retaj kunvenoj kaj renkontiĝoj, tamen tia aranĝo kun reala ĉeesto certe alportas ĝojon kaj kontenton. Mi persone volas reorganizi ISOA-n, t.e. ILEI-seminarion en Orienta Azio, kun la korea kaj ĉina sekcioj de ILEI, kiu estas prokrastita jam dum kelkaj jaroj.

ISIKAWA Tieko

Kroatio



Monato de la kroata literaturo

La 10-an de oktobro Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) kun sia prezidanto Marija Jerković organizis viziton al la elementa lernejo Pavleka Miškine, kie ĝia membro, la instruistino Nataša Dorosulić instruas E-on al tri el siaj gelernantoj (*vd. la foton*). La kunvenon registris ĵurnalistino el la kroata radio Sljeme kaj la sekvan tagon prezentis ĝin al la Zagreba publiko, alvokante la aŭskultantojn, ke ili vizitu la urban bibliotekon Tina Ujevića la 19-an de oktobro, kie Marija Jerković kaj Nataša Dorosulić kun siaj gelernantoj prezentos tradukojn de verkoj de la fama kroata verkistino Ivana Brlić-Mažuranić al Esperanto. Tio okazis kadre de la monato de la kroata literaturo kun la temo: tradukado. Alvenis preskaŭ 70 gelernantoj kun siaj instruistinoj kaj aŭskultis la programon. Enkonduke, Marija Jerković informis la publikon pri tio, kio estas Esperanto kaj kial oni nomas ĝin lingvo-ponto. Nataša

Dorosulić vestis sin per la kostumo prezentanta la verkistinon Ivana Brlić-Mažuranić kaj legis Esperantajn tekstojn el la libroj *Pratempaj rakontoj* kaj *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*. Poste Marija Jerković organizis kvizon pri scio de Esperanto kaj la verkistino Ivana Brlić-Mažuranić. Ĉiuj gelernantoj , kiuj ĝuste respondis, ricevis Esperantan poŝtkarton por memori la okazon. Ĉiuj aŭskultantoj aplaŭdis pro la bone organizita evento.

Marija JERKOVIĆ

Pollando

Postdiplomaj kaj magistraj studoj pri interlingvistiko ĉe AMU: pinto kaj fino

La ***postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj*** – kiuj funkcias ekde 1998 en la pola Universitato Adam Mickiewicz – komencis sian lastan studjaron en septembro per surloka intensa semajno (9-15.09.2023). Mark Fettes profesie gvidis la kurson pri *Nuntempaj problemoj de la Esperanto-movado* ĉerpante ankaŭ el siaj spertoj kiel prezidanto de UEA kaj diskutigante la partoprenantojn. Tiun kurson tradicie Humphrey Tonkin gvidis (el tio naskiĝis lia libro *Lingvo kaj popolo*), antaŭ 4 jaroj Renato Corsetti, do prezidantoj de UEA, kiuj havas larĝan trarigardon pri la movado kaj multjarajn spertojn.

La tria jaro de la studoj ebligas **specialiĝojn**, ĉi-foje:

1) **Tradukado** sub la gvido de Chris Gledhill, kiu instruas tradukadon en la pariza universitato kaj mem tradukadas (ekz. *Hobitoj*). Kontribuis al la kurso Nicolau Dols (gvidanto de la Lingvistika Sekcio de la Kataluna Akademio) kaj Ilona Koutny. Dum la novembra reta sesio kontribuos István Ertl, delonga kunlaboranto de la Studoj.

2) **Interlingvistiko kaj E-movado** sub la gvido de Mark Fettes kaj Ida Stria. Tio ebligis plian enprofundiĝon en la temojn kaj diskutojn. Tiu specialiĝo okazas la unuan fojon.

3) **Instruista trejnado** – kiu estas konstanta specialiĝo de la Studoj sub la kompetenta kaj instiga gvido de Katalin Kováts kaj unika universitata eblo por formi instruistojn de Esperanto. Kontribuis ankaŭ Ilona Koutny, en novembro kontribuos Zsófia Kóródy (el la Esperanto-urbo Herzberg, kie ŝi mem organizas kursojn).



Kun ĉinaj studentoj kaj Duncan Charters en la Germana Kongreso

Al tiu ĉi specialiĝo povis aliĝi ankaŭ aliaj eksteruloj dezirantaj profesiiĝi en instruado (ĉi-foje 6 entuziasmuloj, inter ili du el Serbio, po unu el Ĉeĥio, Ĉinio, Germanio kaj Nederlando).

La dekano de la nova Etnolingvistika Fakultato (kie funkcias IS), prof. Piotr Nowak, amike akceptis la alvenintajn profesorojn. Li alte taksas, ke la Interlingvistikaj Studoj kontribuas al la internaciigo de la universitato. Efektive, el la 16 nunaj persistaj studentoj 14 estas eksterlandanoj, sume el 12 landoj (krom Pollando, el Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Indonezio, Italio, Koreio, Kroatio, Rumanio, Vjetnamio). Raporto en la fakultata retejo: https://we.amu.edu.pl/studia-interlingwistyki-obchodza-25-lecie-na-uam/.

En tiu ĉi jaro la studentoj verkas ankaŭ diplomlaboraĵon el la elektita specialiĝo, do atendas ilin serioza laboro. La rezulton ili prezentos post unu jaro. La plej bonaj semestraj laboraĵoj estas regule publikigataj, ekz. en la lingvistika revuo *Investigationes Lingvisticae* de AMU (pressto.amu.edu.pl).

Dum la sesio aperis la tria volumo de la serio *Interlingvistikaj Studoj*: ***Komunikado kaj Esperanto*** (red. Ilona Koutny. Poznano: IS de AMU & Rys. 290 paĝoj) kiu ĉerpis el la multjaraj spertoj de IS, entenas studojn de instruistoj kaj partoprenantoj de IS. Tiu ĉi volumo kaj la antaŭaj du (Vera Barandovska-Frank: *Interlingvistiko*, 2020 kaj Ilona Koutny (red.): *Esperanta kulturo*, 2021) estas elŝuteblaj el la retejo de la eldonejo RYS kaj de la Interlingvistikaj Studoj.

Kvazaŭ festi la 25-jariĝon de la postdiplomaj interlingvistikaj studoj, en la pasinta studjaro – post granda preparlaboro – sukcesis startigi la ***magistrajn studojn pri interlingvistiko***, kadre de la studfako Lingvistiko kaj informmastrumado, la unuan kaj lastan fojon. La studoj bone progresas kun 10 ĉinaj studentoj, el kiuj 7 venas el la Universitato en Zaozhuang, kie funkcias Esperanto-fako en abiturienta nivelo. Krom mi instruas ankaŭ mia kolego Michael Farris, mia doktoriĝintino Ida Stria kaj du ne-esperantistaj kolegoj.

La studoj kombinas esperantologion, lingvistikon kaj interkulturan komunikadon en Esperanto kun informadikaj konoj en la angla. Ili studas Esperanton kaj la aglan en alta nivelo kaj ankaŭ la tradukadon inter ili. Tiel la studoj provizos la studentojn per uzebla diplomo fine de la dua jaro en 2024. La studentoj diligente kaj entuziasme laboras, sed eluzas sian restadon en Eŭropo ankaŭ por ekskursoj (ekzemple ni partoprenis en la 100-a Germana E-kongreso en majo). En tiu ĉi studjaro ili pretigos sian diplomlaboraĵon, tiel ili kontribuos al la pli granda partopreno de azianoj en diskutoj pri Esperanto kaj ankaŭ al la komparoj inter la ĉinaj kaj eŭropaj lingvoj kaj kulturoj.

La sukceso de la unua grupo donis esperon por pli granda kaj internacia grupo en tiu ĉi jaro. Sed junaj esperantistoj ne montris intereson por la studoj, estis nur kelkaj ĉinaj kandidatoj, sed ne sufiĉaj por la denova komenco de la studoj. Pro tio AMU fermis la studeblecon. En 2024 la magistraj kaj postdiplomaj studentoj finos siajn studojn kaj tiel finiĝos la historio de interlingvistiko en AMU. Kiel lasta festa evento okazos laborsesio pri interlingvistiko kadre de la fama internacia Lingvista Kongreso, kiu okazos ĉi-foje en UAM, Poznano en septembro 2024.

Ilona KOUTNY
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Serbio

Laŭ la plano de ILEI, ankaŭ mi organizis instruhorojn pri Esperanto en lernejo, konkrete en la mezlernejo „Politehnička škola” en Subotica. Kiel eksinstruistino de tiu ĉi lernejo, kun la direktoro de la Lernejo komence de oktobro mi subskribis kontrakton pri volontula agado rilate Esperanton. La lerneja estraro helpis en la informado kaj varbado por la retaj kursoj de Serbia E-Ligo (SEL): dismeti afiŝojn, anonci en Viber-grupoj de instruistoj kaj de klasestroj pri la baldaŭaj retkursoj de SEL, kaj ankaŭ la proponon viziti la instruhorojn de klasestroj por prezenti Esperanton. La fakto, ke dum kelkaj jaroj mi gvidis E-fakrondon en la Lernejo, plifaciligis la realigon de tiu lasta ideo.



Inter la 9-a kaj 18-a de oktobro 2023 mi vizitis 6 klasojn (lernantoj inter 14- kaj 18-jaraĝaj + iliaj klasestroj, entute 147 partoprenantoj) kaj prelegis pri Esperanto – serbe kaj hungare, kun enkonduka kvizo pri lingvoj. Mi reklamis ankaŭ la baldaŭan retan kurson de Esperanto de SEL, sed ne nur. Kreiĝis listo de interesiĝantoj kiuj en la estonteco ŝatus esti informitaj pri Esperanto (eventuala fakrondo en la Lernejo, E-evento k.a.).

Aranka LASLO

Du membroj de ILEI-Serbio, Aranka Laslo kaj mi, Nedeljka Ložajić partoprenas la unujaran Instruistan Trejnadon en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), danke al la Erasmus-projekto de SEL. Ni ambaŭ jam delonge interesiĝis pri la Interlingvistikaj Studoj en Poznano kaj la kondiĉoj ĉi-jare ebligis, ke ni trejniĝu pri metodiko de instruado de Esperanto. La programo de la unua, ĉeesta sesio en septembro estis intensa

kaj enhavoriĉa. Instruistoj, instruantaj kaj instruontaj de E-o, havis eblon aŭskulti prelegojn pri diversaj instrumetodoj kaj lernolibroj uzataj por instrui E-on al samlingvanoj kaj plurlingvanoj. Instruadon de E-o oni, vere, devas serioze trakti kaj tial similaj trejnadoj estas partoprenendaj. La prelegoj, interagaj ekzercoj kaj senpera komunikado kun aliaj instruistoj donas al ni ideojn pri kunlaboro kaj laboro cele al evoluo kaj disvastiĝo de E-o. La etoso dum la unusemajna trejnado estis agrabla kaj ni jam en Poznano interkonsentis pri kelkaj kunagoj. En novembro kaj decembro sekvas du retaj, semajnfinaj sesioj.

Nedeljka LOŽAJIĆ

Fine de oktobro komenciĝis la tria serio de retaj kursoj de SEL per 5 novaj kursoj:

- A – komencantoj – vidantoj, gvidanto: Aranka Laslo kaj Jovan Zarković
- A – komencantoj – blinduloj kaj malforte vidantoj, gvidanto: Nedeljka Ložajić
- B – paroliga kurso por progresantoj, gvidanto: Radojica Petrović
- B – prosperigaj tradukekzercoj, gvidanto: Živanko Novakov
- B – internacia retkurso pri la Literaturo de Esperanto, preleganto: Zlatoje Martinov

Al la A-kursoj aliĝis entute 20 komencantoj ne nur el Serbio, sed ankaŭ el Bosnio-Hercegovino, Germanio kaj Italio. La plej populara landa kurso estas la paroliga kurso por progresantoj, same kun kelkaj alilandaj partoprenantoj – el Aŭstrio, Bosnio-Hercegovino, Hispanio kaj Montenegro. La internacia priliteratura kurso vekis intereson de pli ol 40 esperantistoj, ne nur el Eŭropo (krom Serbio: el Albanio, Bosnio-Hercegovino, Francio, Hungario, Italio, Kartvelio, Portugalio, Rumanio, Rusio, Svislando, Ukrainio), sed ankaŭ el Burundo, Brazilo kaj Israelo.

Aranka LASLO

La fruktoj de agado per unu simpla komputilo

AMO preter la centa seminario

Okazis sukcese seminarioj post la centa, okazinta en Hungario. AMO 101 okazis julie en Latvio, kadre de la Baltaj Eo-Tagoj (BET); nova lando por la AMO-programo. AMO 102 en Lignano (Italio) aŭguste en la Kongreso de ILEI, AMO 103 kun la temo ’Virinoj kiuj ŝanĝis la mondon’ oktobre. AMO 104 okazos tuje en la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) komence

de novembro pri la Amerika kunlaboro. Tio okazas en Fortaleza, Brazilo. AMO 105 estos organizita el Zagrebo pri Eo-libroj en publikaj bibliotekoj. La lasta seminario por 2023 estos AMO 106, kiu okazos en Lomeo, Togolando, kun la temo ‘Esperanto kaj mono’. Kredeble, la unua seminario en 2024 okazos februare el Zagrebo pri la Semajno de Internacia Amikeco (SIA).

EKO eĥas regule, ĉefe pri la loka kaj landa agado

Aperis ĝis la fino de oktobro 61 EKO-komunikoj, kiuj portas informojn el la tuta mondo. La Kovida periodo kaŭzis la urĝan bezonon por kontaktoj. Pro tio la nombro de komunikoj jare abrupte kreskis de ĉ. dudek jare ĝis ĉ. sepdek. EKO daŭre serĉas trian lingvo-kontroliston, kiu tre utile venu el la rondoj de ILEI. EKO forte konigas atingojn de ILEI.

Fondaĵo Canuto aktivas subtene al UEA

En la nuna tago (okt. 26) 490 homoj el 37 landoj estas membrigitaj al UEA en 2023. La ekvivalenta programo en ILEI estas la koleghelpa kaso, kiu meritas subtenon.

SMG: Mia komputika bobelo uzeblas produktive por sproni multan utilan laboron.

Voĉdonu por la retaj ekzamendatoj de KER kaj ekkonu la novajn interagajn ekzercojn de edukado.net

En 2023 en la KER-ekzamenoj de UEA sukcesis 104 ekzameniĝintoj el 31 landoj, inkluzive afrikanojn kaj ankaŭ Aŭstralion. Fine de la jaro ni povas fieri pri 2754 KER-atestiloj en 82 landoj. La disponeblaj niveloj estas B1, B2, C1 kaj C2 kaj la ekzamenoj trapaseblas kaj ĉeeste kaj rete.

Prepare al la jaro 2024 la KER-Ekzamena Centro de UEA lanĉis enketon por ekscii la preferojn de la kandidatoj pri la ekzamendatoj kaj manieroj. Analizante la spertojn de la antaŭa jaro la respondeculoj decidis por 2024 ne organizi tutmondajn ĉeestajn ekzamenojn, sed koncentriĝi nur je la okazigo de retaj testadoj. Ĉeestaj ekzamenoj povos okazi nur en du-tri lokoj, en antaŭe petitaj kaj aprobitaj sesioj de grandaj, landaj aŭ internaciaj aranĝoj, sed nur en tiu okazo, se por la koncernaj unuopaj niveloj kuniĝas minimume po 12 kandidatoj. Tio rilatos ankaŭ al la dumkongresaj ekzamenoj.

KER-EC organizos apartajn retajn ekzamentagojn laŭ la disponeblaj niveloj (B1, B2, C1 kaj C2), en la periodoj de la jaroj, por kiuj kuniĝas la plej multaj voĉdonoj de la interesiĝantoj.
La eblaj periodoj estas: **majo-junio**, **julio** en la semajno de UK rete aŭ/kaj ĉeeste en Aruŝo, kaj **novembro**. Bonvolu esprimi vian preferon en la reta enketilo ĉe https://edukado.net/ekzamenoj/ker/enketilo.
La anonco de la elektitaj ekzamentagoj okazos en januaro 2024. En la monatoj antaŭ la ekzamenoj la retejo edukado.net helpe de la geonkloj de la programo *Ekparolu!* lanĉos preparsesiojn por la kandidatoj.
La avantaĝo de rete trapaseblaj ekzamenoj estas, ke la kandidatoj povas ekzameniĝi el sia propra hejmo, kondiĉe ke ili havas bonan retaliron kaj bazajn kapablojn por uzi komputilon.
Prepare al tiaj ekzameniĝoj estos ekzercado ne nur pri la teknikaj flankoj, sed eblos trapasi en la ekzamena retejo **kompletajn provekzamenojn**, kiuj eble helpos al la kandidatoj ankaŭ elekti la ĝustan nivelon. Por amikigi al la ekzameniĝontoj la retan laborformon edukado.net ekde novembro 2024 republikigas multajn el siaj 900 ekzercoj en rete solvebla, **interaga versio**, kie la uzantoj tuj post la solvo de la taskoj mem povas vidi siajn rezultojn kaj ankaŭ la ĝustajn solvojn de la ekzercoj kaj testoj. Pliajn klarigojn kaj aliron al la kolekto vidu ĉe https://edukado.net/instrumaterialoj/interagaj.

Sukcesan prepariĝon kaj ekzameniĝon deziras al ĉiuj
Katalin KOVÁTS, estro de KER-EC (ker-ekzamenoj@edukado.net).

Leterkesto

Reago al la artikolo „Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo”
(vd. *Intervjuo al Cesco Reale de Alessio Giordano, IPR 2023/2-3*)

Por derivita genre neŭtra triapersona pronomo en Esperanto

Pro la modernaj egaligaj streboj kontraŭ lingva seksismo, unu el la vortospecoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis taŭgan adapton, estas la neŭtragenra triapersona persona pronomo. Estas diversaj proponoj, sed kiu el ili plej bone konvenas al la ekzistanta lingvosistemo, sed sen enkonduki kontraŭ-fundamentan neologismon? Kiu el ili, aliflanke, deriviĝas de ekzistantaj etimoj?

Okupiĝinte pri multaj lingvoj, kaj klopodante konstati la originojn de iliaj pronomoj, mi observis ke, precipe, sed ne nur, ili evoluis el montraj pronomoj (demonstrativoj). Ne nur ili, sed ankaŭ la difina artikolo en tiuj lingvoj, kiuj ĝin havas, tiel estiĝis.

La sistemo de la triapersona persona pronomaro en Esperanto estas

- Li: vira singulara persona pronomo derivita de la Latina „ille" (=„tiu ‚vira' persono")
- Ŝi: ina singulara persona pronomo derivita de la Angla „she" [ŝi] (<Ĝermana „se" (=„tiu")
- Ĝi: neŭtra singulara objekta pronomo ankaŭ uzata por reprezenti bestojn kaj hominfanojn, kies biologia genro aŭ estas nekonata aŭ nesignifa en kunteksto (apriora kreaĵo de Zamenhof)
- Ili: plurala persona pronomo derivita de la Latina „illi" (=„tiuj" inkl. la neŭtron)

La propono de „***ri**" en IPR 2023/3 havus la ĉarmon de unusilabeco, sed ĝi, kiel „ĝi", estas apriora, tamen ne-Zamenhofa. Atentindas, ke la grafemo „r" reprezentas la plej alofonan fonemon de la internacia lingvo, kio povas kaŭzi dubigajn prononcojn.

Mia propono estas deriva, kaj kvankam ne-Zamenhofa, relative sistemkonforma. Kiel observite, la pronomoj en multaj lingvoj deriviĝas de montraj pronomoj, t.e. demonstrativoj. En la korelativa tabelo de Esperanto troviĝas la montra pronomo „tiu", kiu signifas ĝuste „tiu persono", do „sen indiko de genro". Senpera derivo estus „***ti**", unusilaba pronomo sistemkonforma. Kvankam uzado de la posesivaj finaĵoj ne eblus, la genitiva pronomo „ties" ofte jam plenumas la posesivan funkcion, eĉ pli ekonomie ol la pli fleksiaj adjektivaj finaĵoj. La uzado de la akuzativa formo „***tin**" estus senĝene sistemkonforma.

Gerald TUCKER

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
Adreso de la nova arkivo de IPR: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2023,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2024.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de*.
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj

(daŭrigo sur p. 55.)

57-a KONGRESO DE ILEI – MACEIÓ 2024



Unuafoje en Brazilo, unu el la plej gravaj kongresoj de esperantistoj, la 57-a Kongreso de Esperantistaj Instruistoj/ILEI okazos en la bela, turisma urbo, Maceió, en la brazila nordoriento.

Konata kiel „Rideto-Urbo" (Cidade Sorriso) pro la popolo ĉiam ridetanta kaj „Akva Paradizo" (Paraíso das águas) pro tio, ke ĝi estas ĉirkaŭata de lagetoj, riveroj kaj eĉ oceano, nome Atlantika, Maceió troviĝas inter la urboj plej vizitataj de turistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

Kun ĉirkaŭ 40 kilometroj da strandoj kun mirindaj plaĝoj kaj naturaj naĝejoj, Maceió kaj najbaraj urboj atendas vin kaj viajn familianojn por ekskursi kaj ĝui diversajn aktivaĵojn kaj, dum la vesperiĝo admiri spektaklajn sunsubirojn sidante ĉe kioskoj kaj trinkante kokosakvon kaj manĝante tipajn frandaĵojn. Hoteloj kaj gastejoj por ĉies gustoj abundas kaj multaj, fronte al la oceano, restigas turistojn kaj revenigas ilin plurfoje al Maceió pro la ravantaj pejzaĝoj.

Nia urbo jam gastigis du naciajn kaj du junularajn kongresojn, krom tri renkontiĝojn de nordorientaj asocioj. La 57-a ILEI-kongreso estos la unua internacia Esperanto-evento ĉi tie kaj ni esperas, ke ĝi estos mirinda kaj neforgesebla ne nur por vi, kiuj kunsidos kun ni dum prelegoj, debatoj, atelieroj, konversaciaj rondoj kaj aliaj programeroj, sed ankaŭ por viaj familianoj kaj geamikoj neesperantistaj.

Bonvenon al Maceió! La „Akva paradizo" atendas vin!

Laura BRAZZABENI
Estrarano pri kongresoj



Aliĝilo

Personaj informoj
Nomo persona: .....
Nomo familia: .....
Sekso: °Ino °Viro
Naskiĝdato: .....
Naskiĝloko: .....
Profesio: .....

Kontaktinformoj
Adreso: .....
Poŝtkodo+Urbo: .....
Lando: .....
Retpoŝto: .....
Telefono(j): .....

Mi ☐ bezonas / ☐ ne bezonas invitilon por peti la vizon.

Se vi aliĝas ĝis la 31-a de decembro 2023, vi ricevos rabaton de 10 eŭroj.
Jen la kotizo-tabelo kun rondigitaj valoroj en eŭroj:

Aliĝilo:	ĝis 31/03/2024		ĝis 30/06/2024		de 01/07/2024	
Registriĝa kategorio:	A	B	A	B	A	B
ILEI-membro	80	60	95	70	110	85
Ne-membro	105	75	125	85	140	95
Infanoj ĝis 18 jaroj	10	10	10	10	10	10
Junulo, handikapito ktp.	40	30	50	35	60	40
1 aŭ 2-taga partopreno	40	30	50	35	60	40
Nur virtuala partopreno	25	15	30	15	35	20

Kotizoj: ILEI-membro ☐ Handikapito ☐ Akompananto aŭ HM ☐
Partopreno nur virtuala ☐ Familiano ☐ 1- aŭ 2-taga partopreno ☐-

Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno _____ foriro_____

Pagado
Aliĝkategorio: ……

Mi kotizas per € ……
Mi kontribuos al la ILEI-agado per € ……..

Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago de la kotizo kaj mi pagas jene (indiku vian pagmanieron):

☐ Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, aldonante 5 €; el EU-landoj senkoste.

☐ Al ILEI-konto ĉe UEA ilek-a, indikante „ILEI-Kongreso 2024”, kun kopio al ni ilei@kongreso.org

☐ Paypal (*esperantomaceio@yahoo.com.br*) aŭ kreditkarto (senpera tuja konfirmo).

☐ Neniu el tiuj ebloj taŭgas por mi, do mi skribas al ilei@kongreso.org pri miaj cirkonstancoj por trovi kune taŭgan solvon por mi.

Kontribuoj al la programo:
Por la Lingva Festivalo mi proponas prezenti la lingvon: .....
Mi kontribuos al la arta vespero per: .....
.....
Aliaj kontribuproponoj por la kongresa programo: .....
.....
Aliaj komentoj, sugestoj, proponoj, manĝpreferoj ktp.: .....
.....

Mi NE konsentas la publikigon de
☐Nomo ☐Ŝtato ☐Retadreso ☐Telefonnumero

Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Kongresa Regularo, p. 6-9 (https://ilei.info/dok/Konferenca_regularo.pdf)

Loko, dato _____ Subskribo _____

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatu en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELYAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, Erevan, 0010, Armenia, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855, IBAN: NL55 INGB 0004 6768 55, BIC/SWIFT: INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.

c) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (kontonumero: 378964; IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj.

Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Vian retaliĝilon sendu al la membro-prizorganto Hamzeh Shafiee: hamzeho@gmail.com kaj samtempe al ILEI-kasistino Karine Arakelyan: ilei.kasisto@gmail.com. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton. Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).









Unika projekto kun konkretaj rezultoj
– la Lernejo de La Granda Ursino festis siajn 40 jarojn –
(vd. la artikolon de Mónika Molnár sur p. 15)